

1981 junio

74-a jaro

n-ro 906(6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



UEA propradome en Antverpeno

Vi trovos

ekster nia revuo, en unu el tiuj esperantlingvaj periodaĵoj, kiuj dum la lastaj jaroj, dum la lastaj kvin aŭ ses jaroj, faras superhomajn streĉojn por nebuligi la horizontojn en la internacia Esperanto-movado, vi trovos tie aserton, ke la membrostatistiko de UEA pri 1980 (vidu nian martan numeron) estas fabrikaĵo de la redaktoro de ĉi tiu revuo. Tradukite en pli klaran lingvaĵon, tio signifas, ke la statistiko estas mensoga, por eĉ ne paroli pri la redaktoro. Nu! Nedankinde. Ni ripetu ĉi tie, ke la marta statistiko estas ĜUSTA KAJ REKORDA. Fabrikaĵojn kaj mensogojn oni serĉu aliloke. Kiel kutime, ankaŭ en ĉi tiu kazo ni pretas defendi ĉiun vorton kaj ĉiun komon, kiu aperas en ĉi tiu revuo. Nia marta statistiko koncernas ekskluzive la pagitajn kotizojn kaj ĝi estas je dispono al ĉiu bonvola membro aŭ eĉ nemembro de UEA. Cetere, trovu ĉi tie ankaŭ nian bedaŭron, ke necesis post tiom da jaroj reveni al tiu kontraŭmovada movadeto, kiu dum jaroj malsukcese provas semi malamon kaj netoleremon ene de la unueca internacia Esperanto-movado. Atentu, tiuj volus inviti vin en 1987 al iu fantoma "Monda Kongreso de Esperanto", ie en "neŭtrala" mondo. UEA, kies Estraro jam de kelkaj jaroj prilaboras la programon por la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987, baldaŭ informos vin pri siaj planoj, ĉar oni ja ne povas festi la jubileon de Esperanto ekster la Esperanto-movado. Fine, pardonu la galon de ĉi tiuj linioj! Feliĉe, la numero mem estas multe pli hela kaj aginstiga. Ĝuu la junian, scivolu pri la julia!

Enhavo

- 101 Institucio Hodler '68: Por transformi domon en hejmon (V. Sadler)
Subvencioj por 1981
- 102 Ragnarsson en Japanio: Simpozio pri kulturpolitiko
Kion aŭkcii en Brazilo?
- 103 Provo movi la Movadon: Sinjoro A. kaj Irano (Trevor Steele)
- 104 La 33a Fervojista Esperanto-Kongreso: Bona faka laboro, abunda kultura programo (Gernot Ritterspach)
- 106 Ankoraŭ pri Brazilo kaj la kongresa temo: Mikspoto kaj mozaiko — du metaforoj pri Brazilo (Roberto Passos Nogueira)
- 108 Recenzoj: "Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko" de pluraj aŭtoroj (R. Vetter); "Naŭ jaroj en la infero" de Naĉo Kemalov / I. Kovaĉev (T. Steele); "La robajoj" de Omar Kajam / William Auld (Richard Schultz); "Mi amas. . ." de Masao Ueyama (I. Sumber); "Aŭdu kaj lernu", "Nova amiko inter ni" k.a. de Sylla Chaves (W.F. Pilger); "El unu verda vivo" de William Auld (G. Cappa); "Kiel personeco sin strukturas" de Claude Piron (R. Lloancy)
- 112 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 113 TEJO-paĝo: Strasburgo, la dua; "Thespis" en Timișoara
- 114 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 116 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
Ekzameno E (Bernard Golden)
- 117 Anoncetoj
- 119 Esperanto en radio (kompleta tabelo)
- 120 Mistrakto de amikoj (anonco)

La kovrilo

Foje okazas tute ekscitaj festoj, kiuj postlasas grizajn kaj apenaŭ tolereblajn fotojn. Tia estis la inaŭgura festo en la nova domo de Institucio Hodler '68 en Antverpeno, la 10an de majo, kaj — rigardu — tia estas la foto, kiun ĝi postlasis. Kion fari, kiam niaj numeroj devas havi kovrilan bildon rilatan al la enhavo? La numero mem estas neniel griza. Ĉu tio sufiĉas kiel pardonpeto?

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legata en 102 landoj.
Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado, landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176, Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.
Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Por transformi domon en hejmon

ĈU VI iam sopiris al propra domo? Eble tute modesta dometo, sed en kiu vi rajtus ĉion ŝanĝi kaj adapti al la propraj preferoj? "En sia propra domo, ĉiu estas granda homo." Eĉ asocioj kaj institucioj, en siaj kolektivaj subkonscioj, foje kovas tiajn revojn.

Ĉu vi memoras, kiam ankaŭ UEA nur povis lui unu etaĝon en domo de alia? Nur en 1962, grandparte dank' al specialaj donacoj de la membraro, ĝi povis aĉeti la domon, en kiu nun troviĝas la Centra Oficejo en Roterdamo. La kampanjo, kiun la Estraro lanĉis tiutempe por varbi tiujn donacojn, havis tute originalan formon. La Estraro decidis "vendi" — kontraŭ fiksita sumo de po 5000 guldenoj — la unuopajn ĉambrojn de la nova domo. La individuoj kaj organizaĵoj, kiuj bonvolis "aĉeti" ĉambron, povis tiamaniere ligi sian nomon aŭ la nomon de sia lando al parto de la domo. Ĉi tiu artikolo, ekzemple, estas verkata en la ĉambro "Monte-Carlo", kies nomo ĉiam memorigas nin pri gesinjoroj Derks el Monako. Aliaj ĉambroj portas la nomojn de Kanado, Hamburgo, Salberg, Minnaja, Svedujo, Arabio, Nov-Zelando, Saft, La Colla, Aŭstralio, Netrval kaj Zamenhof: konstanta kaj kuraĝiga atesto pri la tutmonda bazo de nia asocia konstruaĵo. Tiuj simbolaj "aĉetoj" kontribuis 65 000 guldenojn (pli ol la duonon de la tiama aĉetprezo de la domo).

Nun venis la vico de Instituto Hodler '68 — tiu financa institucio, kiun fondis kaj kontrolas UEA, kaj kiu

ĉiujare surprizas la movadon per bukado da belaj subvencioj, plukitaj el la fruktoj de ĝia kapitalo. "Hodler" (tiel ni aludas al ĝi familiare) vidis maloftan ŝancon aĉeti je tre favora prezo malnovan sed solidan domon, proksimume same grandan kiel tiu de la Centra Oficejo, en bela kaj centra situo en Antverpeno. Ĝi kaptis tiun ŝancon en la pasinta decembro, kaj nun la domo estas "nia". Baldaŭ la adreso "Frankrijklei 140, B-2000 Antverpeno" estos la komuna trovilo de la Grafika Centro de UEA, de Flandra Esperanto-Ligo kaj de la antverpena klubo "La Verda Stelo".


Tiu nova investo, kvankam tre avantaĝa, fakte superis la nunajn kapitalajn rimedojn de Instituto Hodler. Ĝi estis ebla dank' al entuziasma subteno de la antverpenanoj. "La Verda Stelo" faris al "Hodler" senrentan prunton de preskaŭ 30 000 guldenoj, dum ĝiaj membroj atakis la neglektitan kaj tristaspectan domon per ĉiuj siaj fortoj kaj (mirinde variaj) teknikaj scioj. Ili renovigis la elektrosistemon, riparigis plankojn, farbis, stukis, tapetis, tapiŝis, renovigis kaj reformis ĝis nereconebleco. La 10an de majo jam povis okazi solena inaŭguro de unu tuta etaĝo, kiun disponas la klubo mem.* Ĝi jam funkcias kiel tre konvena kun-

* La Antverpena Esperanto-Grupo "La Verda Stelo" rezervas ĉiun duan vendredon al eksterlanda gasto, kiu kontraŭ partopreno en la programo ricevas 1 000 belgajn frankojn, vespermanĝon kaj tranokton. Skribu (Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen) aŭ telefonu (31 - 16 05 05).

Subvencioj por 1981

SE LA MOVADO tiel amase kontribuas al Instituto Hodler '68, kiel ĝi reagis al la alvokoj pri subvencioj, la artikoloj kiel la ĉi-paĝa fariĝus superflujaj. En sia kunsido de la 9a de majo 1981, la estraro de la Instituto traktis entute 46 petojn pri subvencioj en la alteco de 380 100 guldenoj! Por kontentigi ĉiujn ĉi petojn, necesus rezigni pri la tuta kapitalo de la Instituto kaj eble eĉ vendi la sidejon de UEA en Roterdamo. Feliĉe, la estraro ne venis al tiu ideo, kvankam ĝi ja sufiĉe ŝvitis super la demando, kiel distribui 7 500 guldenojn, kiom ĉi-jare enhavis la subvencia poto. Jen la gajnintoj: Eŭropa Esperanto-Centro — 1 000 (informado al eŭropaj parlamentanoj); Flandra Esperanto-Ligo, Belgio — 500 (kursoj por movadaj aktivuloj); Junulara Kulturdomo en Varsovio, Pollando — 250 (Kastora Klubo, infana aktiveco); Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj — 450 (sendo de brajligita *Paŝoj al plena posedo* al orienteŭropaj blinduloj); s-ro Germain Pirlot, Belgio — 200 (ĝisdatigo kaj reeldono de la sliparo pri leĝa situacio de la Esperanto-instruado); Fondaĵo Oficeja Ilaro de UEA — 2 000 (ampleksigo de la komputila ekipaĵo); Komisiono pri Virina Agado — 500 (Esperanta kaj nacilingva informado); Nov-Jorka Oficejo de UEA — 1 000; Budapeŝta Centro por Sciencteknika kaj Eldona Agado — 1 000 guldenoj.

La nova domo de Instituto Hodler '68 en Antverpeno: Multo ankoraŭ necesas por transformi la domon en komfortan hejmon de pluraj movadaj instancoj. (Ni aperigas desegnaĵon anstataŭ foton, ĉar fotoj ne kapablas prisilenti detalojn).



sidejo por LKK Antverpeno, por ĉiaj estraroj kaj komisionoj.

Ne nur el Antverpeno venis helpo, tamen. Eĉ **antaŭ** ol "Hodler" aĉetis la domon, unu membro jam "aĉetis" unu ĝian ĉambron! Temas pri s-ino Elfriede Ernst en Bruselo. En novembro pasintjare, ŝi ne nur donacis al Hodler 10 000 guldenojn por la nomigo de Ĉambro Ernst, sed ŝi samtempe aldonis 15 000 guldenojn por la Propaganda Konto de UEA, 5 000 gld. por ĝia Eldona Fondaĵo, 3 000 gld. por la Fondaĵo Oficeja Ilaro kaj 750 gld. por la Ĝenerala Kaso!

En la domo de "Hodler" estas ankoraŭ multaj ĉambroj! La Estraro de Instituto Hodler invitas la tutmondan movadon kontribui al tiu nova, tre promesplena centro per simbola "aĉeto" de ĝiaj ĉambroj. Ĉiu ĉambro tiel "aĉetita" portos la nomon elektitan de la donacinto. La minimuma sumo donacenda por unu ĉambro estas fiksita je 10 000 gld., kio, proporcie al la inflacio, estas multe malpli, ol estis en 1962 la sumo de 5000 gld. Se vi konsideras fari tian donacon, turnu vin al la subskribinto, p/a UEA. Tiel "nia" propra domo povas fariĝi iusence ankaŭ "via" propra domo....

V. Sadler,
administranto de Inst. Hodler

RAGNARSSON EN JAPANIO:

Simpozio pri kulturpolitiko

KOMENCE de majo Baldur Ragnarsson, vicprezidanto de UEA kaj estrarano pri kulturo, revenis de 20-taga vojaĝo tra Japanio. Kvankam grava celo de tiu vojaĝo estis privata vizito de ges-roj Ragnarsson al la familio de sia filo Ragnar Baldursson (kiu studis en Ĉinio kaj edziĝis al japanino), la japana Esperanto-movado nepre volis profiti la ĉeeston de la konata poeto kaj funkciulo. Jen do la resumo de la movada parto de tiu vizito: Ĉe Japana Esperanto-Instituto en Tokio Ragnarsson gvidis plurhoran simpozion pri la kulturpolitiko de UEA. Partoprenis trideko da spertaj esperantistoj, kelkaj alvenintaj el Nagojo. Ragnarsson tie detaligis plurajn ideojn el siaj tekstoj aperintaj en la februara kaj aprila numeroj de nia revuo. Li emfaze pledis pri la kunordiga rolo, kiun UEA povus kaj devus ludi en la Esperanta kulturo.

En Tokio okazis du pliaj prelegoj de la islandaj gastoj: Ragnarsson prelegis pri "La Sagaoj kaj Zamenhof: Stabiligaj faktoroj", kie li substrekis la rolon, kiun la islanda klasika literaturo ludas en la konservo de la islanda lingvo, kaj paraleligis tion kun la efiko de la Zamenhofa verkaro en la evoluo de Esperanto. Lia edzino, Thorey Kolbeins (vi ja memoras, ke ĉiu islanda familiano havas vere proprajn kaj apartajn nomon kaj antaŭnomon) prelegis pri la islanda eduksistemo ĉe la infanlerneja stadio, kun aparta konsidero de la edukado de handikapitaj infanoj. Ambaŭ prelegoj okazis

kun traduko en la japanan, ĉar ĉeestis ankaŭ ne-esperantista publiko.

Ges-roj Ragnarsson pasigis tutan semajnon vojaĝante tra la centra Japanio, kie ili vizitis la urbojn: Kioto, Takatsuki, Osaka, Kameoka kaj Nagojo. Ragnarsson prelegis en ĉiu el tiuj lokoj (en Nagojo trifoje!).

Post la reveno al Rejkjaviko Ragnarsson skribis al ni: "Mi multe informiĝis pri la situacio de la Esperanto-movado en Japanio kaj faris multajn gravajn kontaktojn, kiuj espereble plifruktiĝos en utila kunlaboro inter la Esperanto-centroj tie kaj UEA sur la kultura kampo."

Kion aŭkcii en Brazilo?

PASINTJARE en Stokholmo, kvankam unuafoje en la kongresa programo, la aŭkcio montriĝis esti unu el la plej viglaj kaj amuzaj kongresaj eroj. Aldone al tio — aŭ unuavice, se vi volas — ĝi enkasigis grandan monsumon por la Fondaĵo Azio-Afriko. Ĉio ĉi donis al la kongresorganizantoj la necesan kuraĝon enmeti ankaŭ en la programon de la 66a UK en Brazilio aŭkcion favore al la Fondaĵo Canuto. Sed, kion ni aŭkcii en Brazilio?

Stokholmaj kongresanoj memoras, ke la plej altan prezon tie atingis la kongresa libro de Bulonjo-sur-Mar. Ni tamen ne kredas, ke iu ankaŭ ĉi-jare en Brazilio aperos kun superflua ekzemplero de tiu raraĵo. Kelkaj aliaj aŭkciaĵoj stokholmaj ne estas ripete vendeblaj en Brazilio, ĉar ilia valoro intertempe — supozeble — spertis inflaciajn efikojn. Ni ne celas per tio nepre la matenmanĝojn kun la tiam nova kaj eksa prezidantoj de UEA, kvankam ankaŭ ili du ne plu estas tiel freŝaj (t.e. freŝdataj) kiel en Stokholmo. Nun ŝajnas, ke ni en la 66a UK havos la prezidanton de la Akademio de Esperanto. Eble do iu volos matenmanĝi kun la aŭtoro de *La infana raso*, kondiĉe ke la organizantoj sukcesu veki lin ĝustatempe por matenmanĝo. Pensu do pri ĉiuj tiuj prezidantoj kaj la eblo helpe de ili kontribui al la Fondaĵo Canuto!

Iu ĉi tie en Roterdamo insiste provas donaci por la aŭkcio la ankoraŭ funkciantan pan-rostilon de Andreo Cseh, sed ni ne sukcesis solvi la transportajn kaj dogajn formalizaĵojn pri ĝi, kaj ni komencas dubi, ĉu tiu muzeajo aperos en Brazilio. Kio certe venos al la brazila aŭkcio estas kelkaj aparte valoraj Esperantaj filatelajoj, pluraj raraj libroj, praaĵ arkivaĵoj, tute bela kolekto de Zamenhofaj fotoj, delonge elĉerpitaj Esperanto-diskoj ktp. Pensu mem pri ĉi tiu demando kaj, se vi povas kaj volas subteni la Movadon en tiu ĉi maniero — kunportu vian aŭkciaĵon al Brazilo, sendu ĝin pere de iru el la kongresanoj aŭ, se vi juĝas, ke ankoraŭ restas tempo, sendu ĝin al la CO de UEA. Laŭ malnova interkonsento, en Brazilio ni havos aparte spertan aŭkcianton — d-ron Humphrey Tonkin.

Sinjoro A. kaj Irano

En februaro pasintjare ni represis artikolon el "Transoceana", revuo de Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto. Jen ni denove prunteprenas tekston de tie, ĉi-foje el la numero 17/1981. Cetere, se ni ne ekspluatus "Transoceana" de tempo al tempo, vi eble eĉ ne rimarkus ĝian ekziston. Notu la adreson de la aŭtoro de la sekva teksto, ĉar li redaktas "Transoceana": T. Steele, 3 Woodridge St., Moorooka 4105, Aŭstralio. Petu foje provekzempleron de tiu interesa revueto.

NI KONSIDERU la evoluon de s-ro A. Kiam li unue konatiĝis kun la Internacia Lingvo antaŭ x jaroj, li bonkore supozis, ke baldaŭ la tuta mondo devos trovi la solan racian solvon de unu el la plej obstinaj problemoj de la homaro; li mem ja trovis ĝin! Li ĵetis sin en la batalon por Esperanto kaj pli humana mondo. Li subtenis ĉiun novan iniciaton kaj mem lanĉis kelkajn. Li eĉ persvadis sian kuzon enskribiĝi al la komenca klaso.

Sed la kuzo enamiĝis aŭ ricevis novan postenon en alia urbeto sen Esperanto-klubo — ĉiukaze la semo ne kreskis en li. La multpromesaj kampanjoj, en kiuj s-ro A. fervore partoprenis, ial ne alportis videblan gajnon. Eĉ la fideluloj, kiujn li instruis, montris sin mizere malrapidaj lernantoj. La vere inteligentaj homoj, kiuj, li ja sciis, lernus la lingvon ludante, ial preferis okupiĝi pri aliaj, multe malpli facilaj lingvoj.

S-ro A. sentis sin vundita de la miopeco, pigreco kaj stulteco de la homaro. En iu malbona horo li eĉ pripensis, ĉu li mem rezignu pri la bela sed ŝajne senespera

revo, kiu kostis al li tempon, monon kaj mensan trankvilon. Sed li konsciis, ke tia paŝo estus perfido kaj stultaĵo; ke ĝuste pro la manko de videbla progreso la movado des pli bezonas fidelan subtenon de ĉiu unuopulo.

Tamen li decidis sin protekti kontraŭ amaraj elreviĝoj. Li ne plu permesos al si tro entuziasmiĝi pri ia ajn novaĵo rilate Esperanton. "La fina venko" fariĝis por li sonora dumkongresa slogano; se ĝi rilatis al la realo, do iam en fora epoko. Li ja pledis perletere al sia loka nacilingva ĵurnalo por la disvastigo de Esperanto, sed foje li konfesis al si, ke plaĉas al li la etoso de diaspora grupeto. Kiam oni konstante renkontas la samajn homojn ĉe kongresoj, amikecoj kreskas, sed samtempe oni evoluigas preskaŭ sektecan pensmanieron.

De tempo al tempo s-ro A. agnoskis, ke la estanta movado ne estas perfekta. Iu neĝentila "samideano" esprimis sian dubon, ĉu la limakpaŝa progreso ĉe UN, EEK, ktp. pravigas la tiulokan "investon". Kiel s-ro A. prave atentigis, la problemo estas dilema. Se iu kritikis la nunan politikon pri eldonado de klasikaĵoj el la eŭropa literaturo, s-ro A. iom kolere petis alternativajn proponojn, sed ne vere volis aŭskulti la respondon. Kiam iu asertis, ke la movado neglektas eble la plej necesan elementon de sia kreskado, nome instruadon, s-ro A. grumblis pri la nekomprenebla antaŭjuĝo de profesiaj instruistoj kontraŭ Esperanto. Sen rimarki sian evoluon, s-ro A. fariĝis konservativulo, kiu ne plu sciis, kiel reagi, se subite amasoj da homoj montrus fortan intereson pri lia lingvo.

La nekredeblaj novaĵoj komencis alveni el Irano. Kaj ne ĉesis alveni malgraŭ la tumulta politika situacio de la lando. Mirinde, Saheb-Zamani! Ni elkore gratulas! Sed kiam la irananoj petegis pri tradukoj de sciencaĵoj kaj teknika literaturo ... nu, tio ĝenis, ĝi estis tro nova. Kaj Irano estas finfine ... kiel ni diru? ... tre fora lando. Kaj krome estus eraro ekscitiĝi pri eble efemeraj triumfoj.

Ni ne tro kritiku s-ran A. Sen li nia movado ja ne ekzistus, ne ricevus kotizojn, ne havus kворumon. Vi kaj mi havas almenaŭ kelkajn el liaj karakterizaĵoj.

Sed ni devas atentigi nian amikon, ke lia konservativeco riskas perdi al Esperanto probable ĝian ĉefan ŝancon ekde 1887. Dum preskaŭ unu jarcento ni provis frapi ĉe oficialaj pordoj en Eŭropo kaj aliaj riĉaj landoj. Sed tiuj landoj ŝajne kredas sin sufiĉe riĉaj por dungi armeon da tradukistoj-interpretistoj; la luksaĵo de neracia lingvopolitiko estas ankoraŭ pagebla.

La diferenco en Irano estas, ke tie miloj da homoj lernas Esperanton, ĉar ili vidas en ĝi ne nur idealon, sed ion necesan por si kaj sia socio. Estas tre neverŝajne, ke la elitoj, kiuj konsistigas registarojn kaj do estas, kian ajn partian simbolon ili portu, baze konservativaj, adoptos la revoluciigan ilon Esperanto, antaŭ ol la amasoj trudos tiun decidon al ili. Irano montras al ni la vojon el la propaganda labirinto.

Ĉu s-ro A. ĝustatempe konscios tion?

Trevor Steele



La vojo al la "fina venko" iras tra la kongresaj bankedoj.

Bona faka laboro, abunda kultura programo

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), la plej granda faka organizaĵo en la Esperanto-movado, kongresis ĉi-jare en Regensburg (FR Germanio). Tie inter la 15a kaj 21a de majo kolektiĝis 515 gekongresanoj el 18 landoj. La kongreson karakterizis abunda kultura kaj distra programo, bona faka laboro kaj vigla ekstera informado. Kiel regule okazas dum la lastaj jaroj, ankaŭ ĉi tiu IFEFF-aranĝo okazis kun ekstermovada subteno de internaciaj fervojistaj organizaĵoj.

LA ALVENINTOJ jam en la stacidomo sentis sin en Esperantujo: eksonis el la laŭtparolilo sur la kajo esperantlingva bonvenigo kaj invito veni al la akceptejo en la ĝiĉeta halo. Rapida informo kie situas la hoteloj, Esperanto-flagoj antaŭ la stacidomo, mallongaj vojoj, jam en la kongresejo "Kolpinghaus", kie la kasisto etendas enspezeman manon antaŭ ol disdoni la kongresdokumentojn.

Ĉiuj sep salonoj portis nomojn de aktivuloj en la fervojista movado. En la vestiblo ampleksa ekspozicio "Esperanto – Strato al la mondo". Okulfrapis korespondadoj ĉirkaŭ mondmapo, kolekto de Esperanto-poŝtmarkoj kaj fervojaj horarlibroj kun esperantlingvaj klarigoj el sep landoj (BG, CS, DK, H, I, N, PL). En angulo kiosko kun bildkartoj, insignoj, belaj kaheloj kun la kongresa emblemo, kaj filatela koverto kun speciala poŝtstampo. Antaŭ la enirejo al la salonego "Lok", ejo de la interkona vespero, ampleksa librobudo. Du etaĝojn pli alte laboris sendstacio de fervojistaj radioamatoroj: "ĉi tie Delta Lima Nulo, Bravo Cigaredo", t.e. DL Ø BC. Respondoj ne mankis, en la unuaj tri tagoj ĉ. 150 radio kontaktoj realiĝis kun 21 landoj.

Sabaton matene pastoro A. Burkhardt (KELI) kaj pastro B. Eichkorn (IKUE) komune gvidis ekumenan diservon en la preĝejo Sankta Emmeram. Solkantis Barbara Kohl, Luksemburgo, muzikis Trombona Koruso el Heilbronn. La prediko tuŝis tre aktualan, ekologian temon.

Antaŭ plenplena salono disvolviĝis la inaŭguro. Ĉiuj parolantoj uzis la Internacian Lingvon, des pli tedis la germanaj resumtradukoj (pri kiuj insistis mondana instanco). Malfermis la vicon LKK-prezidanto Joachim Giessner, kiu salutis la honorajn gastojn kaj la gekongresanojn. La prezidanto de FISAIC (internacia federacio de kulturflegantaj fervojistoj), d-ro Emile Schlessen el Luksemburgo, akcentis la multflankajn problemojn ĉe internacia agado, ĉu temas pri aŭtomatiko, ĉu pri cibernetiko, ĉu pri enkonduko de aŭtomata kuplilo, kaj li bedaŭris, ke oni ankoraŭ ne povis interkonsenti

pri komuna lingvo. La prezidanto de la fervoja direkcio Nürnberg, ing. Horst Weigelt, gratulis al la kongresanoj pro la mirinde efika maniero, laŭ kiu ili utiligas la tutmondajn kontaktablecojn, por flegi interhomajn rilatojn dum siaj laboro kaj libertempo, por redukti la streĉitecon ĉie senteban. La ĉefurbestro de Regensburg, Friedrich Viehbacher, komparis la rolon de sia urbo, kie rezidis mezepoke dum preskaŭ 150 jaroj la Konstanta Regna Parlamento, kun la laboro de la esperantistoj por translima interkompreniĝo, kun la celo forigi lingvajn barojn inter la popoloj.

Longa estis la vico de salutparolantoj, fervojinstancoj, sindikatoj, Esperanto-organizaĵoj, el kiuj mi nome citu nur ankoraŭ la prezidanton de UEA, Grégoire Maertens. Li komparis la Internacian Lingvon kun arta mozaiko, enhavanta multegajn diverskolorajn ŝtonetojn — la multfakaj eroj de la Esperanto-movado. Iuj koloroj aperas ofte, aliaj pli raras. Se oni elprenus nur malmultajn, la harmonio estus tamen detruita. La oficialan malfermon de la kongreso deklaris, post la salutoj de 15 landaj sekcioj, la vicprezidanto de IFEFF, Per Engen el Norvegio. Solenan karakteron donis al tiu inaŭguro muziko de fervojista kvarteto el Nürnberg. Sur la podio dume sidis, en la dua vico, uniformportantaj fervojistoj el 15 landoj, kiuj antaŭe pozis por fotografado.

Nun la laboro povis komenciĝi. Ĉar ne eblas kronologie ĉion priskribi, necesas resumi. La organiza laboro disvolviĝis en du kunsidoj de la estraro kun komitato kaj du plenkunsidoj. La ĉefurbestro de Regensburg akceptis 70-personan delegacion en tradicirika urbdoma salono. Fake laboris tri komisionoj: la fakprelega komisiono unuafoje ne nur sin okupis pri la kongresa fakprelego, sed sukcese iniciatis prezentadon de fervojaj novaĵoj el diversaj landoj. La historio-komisiono fiksas la venontajn paŝojn en la preparo de eldonota broŝuro. La terminara komisiono laboris dufoje kvar horojn kaj trovis interkonsenton pri ĉiuj por tiu kongreso elektitaj diskutendaj terminoj, inkluzive de ties difinoj, ekzemple: nadlorela, trakforko, relkomutilo, traktio, traknivela pasejo, trajnkruciĝo, trajnpreterpaso, por citi nur kelkajn. La kruda traduko de seslingva oficiala fervoja leksikono, kun ĉ. 11 000 terminoj, estas finfarita, nun daŭras la internacia reviziado.

Prelegon pri naskiĝo kaj maturiĝo de la magnetglita tekniko, "trajno sen radoj", prezentis Gernot Ritter-spach, montrante 92 diapozitivojn kaj 18-minutan filmon. Kvankam la temo estis tre komplika, la klarigoj, en facila lingvo kun multaj bildoj, ebligis kompletan komprenon al la plimulto de la aŭskultantoj. La multobligita teksto estis disdonita post la prelego, krome, ĝi aperis en *Monato* 5/81. Lingvoinstruadon en du niveloj, por komencantoj kaj por

kursgvidantoj, prezentis s-ino Audrey Childs-Mee, kaj kursfinan ekzamenon sukcese trapasis tri kandidatinoj. La kulturaj programeroj estis respektinde altnivelaj. Jam menciita estas la ekumena diservo. Samloke, en la preĝejo Sankta Emmeram, okazis koncert- kaj kant-vespero "De l'mezepoko ĝis nuntempo". Verkojn de Händel, Schubert, Beethoven, Dvořák kaj Bach/Gounot kantis Barbara Kohl kaj Anni Wiesmann (spora-
no), Ludwig Fluck (tenoro) kaj la fervojista virĥoro de la lokomotivejo Plattling; ludis fervoja ĉambro-orkestro el Nürnberg kaj folkloraj ĉambro-muzikantoj el Plattling. Kulmino estis la "Meso de Greising", komponita en 1972 de Helmut Gärtner. La sereneco de la melodioj kaj la folkloraj ĉambro-muzikiloj — tute nekutimaj por meso — elvokis entuziasman aplaŭdon, kvankam oni troviĝis en preĝejo!

"Regensburga bukedo" estis la titolo de folkloraj vespero, dum kiu kantis virinkvarteto el Grafenau, virvoĉa trio el Plattling kaj Walter Lange (baso). Dancis la grupo Alpina. Por ke la kongresanoj havu okazon aŭskulti la mondfaman knabĥoron "Katedral-paseroj", LKK rezervis 200 sidlokojn en la dimanĉ-matena diservo. Literatura konkurso por originalaj kaj

ĉiuj ekskursanoj por komuna kantado. Cetere, ĉiujn kantojn, ankaŭ por la preĝeja kantprogramo, tradukis LKK-prezidanto Joachim Giessner. La tria ekskurso kondukis denove ŝipe sur la rivero Danubo tra ĝia mallarĝa fendobreĉo proksime de Kelheim. Dufoje dum la kongresa semajno estis okazo por gvidata rondiro tra la urbo Regensburg, kaj malgranda grupo povis viziti la laborejon de la katedralaj ŝtonĉizistoj. Eĉ jogo-instruado okazis laŭ peto de kongresanoj.

Por certigi informadon al la publiko okazis gazetara konferenco unu tagon antaŭ la kongreso. Deko da ĵurnalistoj kaj sindikat-reprezentantoj ĉeestis kaj minimume 5 artikoloj estis la rezulto. Jam antaŭ la kongreso aperis 54 artikoloj kaj atentigoj pri ĝi en Esperanto-gazetoj, 24 en aliaj gazetoj. Telefonan intervjuon kun la LKK-prezidanto petis la radiostacio Deutsche Welle. Publika informbudo en la urba zono por piedirantoj funkciis dufoje kaj donis okazon por alparoli multajn preterpasantojn, eĉ tutan lernejklasson. Multegaj varbiloj estis disdonitaj. La speciala stampo, havebla nur en la kongreseja poŝtgiĉeto, allogis ankaŭ interesitojn de ekstere, kaj la vestiblon kun la ekspozicio trairis multaj Regensburg-anoj.




Diverslandaj fervojistoj pozas en siaj uniformoj okaze de la 33a Fervojista Esperanto-Kongreso, meze de majo en Regensburg

tradukitaj verkoj pri la fervojo — prozo kaj poezio — trovis grandan eĥon kaj la juĝkomisiono nur malfacile povis decidi kiuj ricevu la kvar premiojn. La premiitajn verkojn kaj plurajn aliajn recitis Helmut Rössler. Por distrado zorgis Trixini, "la magiisto kun la Blua Ŝtono", per vespero kun bonegaj iluziaĵoj kaj prestidigitaĵoj; balo donis okazon por dancado laŭ modernaj ritmoj. Tri ekskursoj per aŭtobusoj estis en la programo. Veturante al la montara kuraĉloko Falkenstein oni haltis ĉe la templo Walhalla, starigita honore al famaj germanoj. Dum tuttaga ekskurso per aŭtobusoj kaj ŝipo oni veturis al Passau, kie oni i.a. aŭskultis tre faman orgenon. Ĉiu aŭtobusgvidanto kunportis muzik-kaseton kun kantoj en Esperanto, kies tekstojn ricevis

La kongresanoj mem ricevis ampleksan kongreslibron, i.a. kun parta represo kaj traduko de la plej malnova amletero germanlingva (el 1360). Ĉiuj disdonitaj prospektoj pri Regensburg kaj pri la ekskursceloj enhavis esperantlingvajn aldonfoliojn. Estis eldonita trifoje "Kongresa bulteno", kun entute 12 paĝoj, por informi la kongresanojn pri la okazintaj programeroj kaj por certigi bonan raportadon poste. Pri la venontjara kongresloko Balatonfüred en Hungario, la hungaraj kolegoj montris interesan filmon kaj belajn diapozitivojn. Certe multaj fervojistoj venos en 1982 al la Balatona Lago. La flago de IFEF, solene transdonita dum la kongresfermo, jam estas survoje tien.

Ritt

Mikspoto kaj mozaiko — du metaforoj pri Brazilo



Kristo-statuo
sur la monto
Korkovado
super Rio
de Janeiro

TROVI ESENCAN KARAKTERIZON de la brazila gento kaj de Brazilo mem estas preskaŭ neeble. Tiel heterogenaj kaj multaspektaj prezentiĝas la homtipoj kaj regionoj de la lando, ke la identeco rezultas ĝuste el miksiĝo kaj diverseco. Pro tio, la **mikspoto** kaj la **mozaiko** estas figuroj ordinare uzataj por reprezenti la proprecojn de la brazilaj lando kaj popolo. Ĉi tie ni priskribas tiujn du metaforojn kaj aldonas mallongan kritikon pri iliaj misuzoj.

La etnia fandiĝo kaj la kultura sinkretismo ebligataj de la renkontiĝo, sur la brazila teritorio, de la "tri rasoj" (eŭropanoj, negroj kaj indianoj) estas ĉeftemo de pluraj seriozaj aŭtoroj, kiuj penis difini la **brazilanecon**. Unu el la plej konataj estas sendube Gilberto Freyre, kies plej elstara verkaĵo, *Casa-Grande e Senzala* (Sinjor-domo kaj sklavejo), estas tradukita en plurajn lingvojn.

Freyre emfazas, ke la portugaloj distingiĝas kiel la solaj eŭropaj koloniintoj, kiuj, venkante ĉiajn antaŭjuĝojn, kapablis libere kuniĝi kaj sin reprodukti kun aliaj gentoj en la novaj landoj, ne nur rilate la indiĝenojn, sed ankaŭ rilate enportitajn rasgrupojn, kiel la negrojn el Afriko. La ebena beleco de la negraj sklavinoj kaj la spontana kaŝolemo de la indianinoj forte ĉarmis la portugalojn, super ĉiuj sociaj konvencioj, kaj, laŭ Freyre, "potence agis sur la formiĝon de Brazilo, ĝin dolĉigante". La natura sentama inklino de la portugaloj helpis krei, tiamaniere, iaspecan "etnian demokration", kiu favoris la socian ascendadon de la mulatoj kaj mestizoj, samtempe mildigante la antagonismojn ekzistantajn aliloke, bazitajn sur troaj kontrastoj de haŭtkoloro. Tio igis malpli drastaj la konsekvencojn de la sklava sistemo larĝskale adoptita precipe ĉe la mineja ekspluatado (en Minas Gerais) kaj la sukerkana planta-

do (en la nordoriento). Venintaj el Angolo, Kongo kaj aliaj afrikaj landoj, la negroj povis fari signifan kontribuon al la kuirarto, muziko, danco, religio kaj — ĝenerale — al la moroj de la brazila popolo, influante eĉ pli intense ol la indianoj mem, kiuj estis la naturaj praloĝantoj de Ameriko. Jen kiel klariĝas la imagaĵo pri "mikspoto de rasoj kaj kulturoj".

Ĉu la civilizo konstruita de la portugaloj, pere de la rasaj kruciĝoj entreprenitaj de tiaj "generantoj de la tropiko", donis al la brazilano propran karakteron? Ĉu simila historia formiĝo, kiel procezo de etnia kunfandiĝo, permesis al la brazila homo akiri individucon? Pri ĉi tiuj tiklaj problemoj okupiĝis historiistoj kaj sociaj sciencistoj, kvankam al aliaj aŭtoroj tia demando pri identeco ŝajnis falsaĵo aŭ simple harfendaĵo. Kelkaj el ili provis montri, ke la brazilano estas aparte dotita per trajtoj de konduto kaj karaktero kiel la afableco, toleremo kaj adaptiĝa kapablo. Temas pri homo, kiu krom afable trakti siajn similulojn, montras naturan scivolemon pri la moroj kaj vivlokoj de aliaj homoj, al kiuj eventuale li sukcesas facile adaptiĝi. Kiel tipa "miksiĝulo", li ne alkroĉiĝas rigide al kulturaj valoroj kaj tradiciaĵoj; male, li plej emas konstante moviĝi, renovigi kaj variigi. Evidente, tio ne signifas rifuzon al sia propra kulturo; ĝi estas simple la fundamento de sinteno esence tolerema antaŭ la noveco kaj la fremdaĵoj. Tio permesas al la brazilano havi sagacan spiriton, kiu lin pelas al vivado spontana kaj sen troaj zorgoj, tiel karakterize esprimita ĉe la "kario-koj" (anoj de Rio de Janeiro).

Se oni akceptas tiun starpunkton, la ideo pri mikspoto kondukas do al tiu pri nova individueco, kiu ne nuligas la ordinarajn trajtojn, sed ilin retenas aliformitaj (kelkfoje en sinkretisma formo), koncerne tiel la konkretajn kulturajn manifestiĝojn kiel ankaŭ la homan karakteron.

Alia tradicia metaforo uzata por speguli Brazilon estas la **mozaiko**. Ĝi estas parenca al la ideo pri mikspoto — dum unu substrekas la diversecon en la formiĝo de la brazila gento, la alia konsideras la nun ekzistantan diversecon. La multeco de homtipoj kaj regionoj, en teritorio de 8,5 milionoj da kvadrataj kilometroj (la kvara en la mondo), estas la substanco de tiu mozaiko. Vizitinte Brazilon antaŭ kvar jardekoj, Vera Kelsey verkis varme simpatian libron pri la lando utiligante tiun imagaĵon. Ŝi mencias la statuon de Kristo en la monto Korkovado, kovritan per miloj da fajnaj multkoloraj trianguletoj, kiel objektivan reprezenton de tiu

multobla konsisto de Brazilo. Temas pri mozaiko el "historioj, religioj, ekonomioj, kulturoj, ritmoj, sangoj" konstruita per la diferencaj gradoj kaj manieroj de interkruciĝo de la tri originaj gentoj, al kiuj poste aldoniĝis (precipe en la sudo) la kontribuo de la enmigraj grupoj de italoj, germanoj kaj japanoj.

Cetere, ekzistas regionoj tiel karakterizitaj de ekologiaj kaj ekonomiaj specifajoj, ke, veturante laŭlonge de la 5000 mejlojn longa marbordo, oni havas la impreson (kiel rimarkigas Kelsey), ke la vojaĝo ne kontinuas, sed konstante ŝanĝigas. Vere, kia simileco povas ekzisti inter la sovaĝa verda mondo de la Amazonia arbarego kaj la vaste kulturitaj valoj kaj ebenaĵoj de São Paulo kaj Minas Gerais? Kaj inter la faŭne abundaj marĉoj de Mato Grosso kaj la sekeca arbeda "caatinga" de la nordoriento? Al eksterlandanoj estas surprize konstati, ekzemple, ke la nigruloj kaj mulatoj de Bahia, kun siaj religiaj ritoj kaj dancoj afrikecaj, apartenas al la sama nacio kaj parolas la saman lingvon kiel la blankaŭta gaŭĉo de Rio Grande do Sul kaj la mestiza vakero de la nordoriento. Tamen, Brazilo estas unueca nacio, federacie organizita, kie la diverseco de etnia origino ne kondukas al apartiĝemaj kaj diskriminaciaj sentoj. Tian unuecon interne de la diverseco esprimas trafe la figuro de la mozaiko, ĉar temas pri tutaĵo organike strukturita kaj ne senkohera kunmeto de malsimilaj elementoj.

Priskribi Brazilon kiel mikspoton aŭ mozaikon de rasoj kaj kulturoj riskas fariĝi ŝablono, kiun eĉ turismaj prospektoj kelkfoje emas trouzi. Kvankam rivelantaj esence verajn aspektojn de la formiĝo kaj aktuala kon-

sisto de la brazila nacio, ili estas simplaj analogioj el ia pli-malpli optimisma vidpunkto, kiu emfazas nur la pozitivajn ecojn de la situacio kaj nek montras nek interpretas kontraŭdirojn, kiujn ne eblas nei, historie kaŝitajn en la procezo de "fandiĝo" kaj kunekzistado de kontrastaj elementoj.

Rilate la teoriojn de Freyre, oni povas eĉ diri ke, laŭdante la ŝajne sen-antaŭjuĝan sintenon de la portugaloj, li pravigas la koloniisman agadon kaj neglektas aliajn sociajn faktorojn kiuj kondukis al la rasa miksiĝo. Ekzemple, estis ĝuste la utileco de la negroj kiel laborforto kiu permesis la pretervivadon de iliaj kulturaj valoroj, dum la indianoj – netaŭgaj sklavoj – suferis politikon de sistema ekstermado fizika kaj kultura. Krome, tia analizo tiel multe baziĝas sur la ideo pri "raso", ke ĝi povas motivi iaspecan "rasismon inversigitan".

Tamen similaj bildoj koncerne la rasan demokration kaj toleremon troviĝas ankaŭ ĉe malpli konservativaj verkistoj ol Freyre – ni menciuj nur la faman romaniston Jorge Amado, kiu tiel portretas la homrilatojn en Bahia.

Pri la "mozaiko" sufiĉas aldoni, ke oni ne povas neglekti la negativajn kontrastojn. Kaj unu el la plej okulfrapaj estas la diferenco de vivniveloj inter la industria centro-sudo kaj la nordoriento, kun ĝiaj arkaikaj agraj strukturoj kaj ĝenerala malriĉeco.

Konklude, ambaŭ metaforoj ne devas esti uzataj en absoluta signifo, ĉar el ili povas origini romantika bildo pri Brazilo, falsante la realon, kiu neniam estas tiel rozkolora kiel pentrita en turismaj reklamoj.

Roberto Passos Nogueira



Iama mikspoto de gentoj kaj kulturoj transformiĝas en unuecan mozaikon: Karnavala festo pri la integriĝo de la tri rasoj.

Tempo por monata scienca periodaĵo

Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko 1980.

Red. Zdeněk Pluhař. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1980. 104p. Multobligita. 29cm. Prezo: 18,00 gld.

Cent paĝoj ampleksantaj 20 sciencajn seminari-referaĵojn de *Scienca Revuo* kaj *Sciencaj Komunikaĵoj*, parte eĉ de konataj aŭtoroj. Tio signifas artikolojn en perfekta Esperanto, kompreneblajn por la klera nefakulo. La temoj estas aktualaj: ekologiaj kaj fakterminaj problemoj, samkvante. Estas ĝojige konstati, ke en la nunaj jaroj regule aperas altnivelaj klerigaj tekstoj verkitaj de sciencistoj kaj teknikistoj, sufiĉe specialismaj por ekzerci la faklingvon, kaj ke, aliflanke, multiĝas la iniciatoj por starigi fakterminarojn por tre specialismaj branĉoj.

Interesa fenomeno: en 1975, dum *Scienca revuo* stagnis, ekaperis *Sciencaj komunikaĵoj*. En 1980 tiu lasta stagnis, sed aperis *Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko*. En ĉiuj tri kazoj la nombro de paĝoj en unu jaro estas proks. 100. Ĉu mi malkovris invarianton, kiel nomas tion la matematikistoj, aŭ leĝon de konserviĝo, en la lingvo de la fizikistoj? Ne, la verkista potencialo de nia sciencularo estas pli granda, simple mankas forta organiza bazo por eldoni kaj por abonigi ĉiujn de abiturienta nivelo en la Movado. Ekzistas latentata ebleco de impona monata scienc-kleriga periodaĵo, se la kapabloj disponeblaj en ekz. *Sciencaj komunikaĵoj*, *Scienca revuo*, *Homo kaj kosmo*, *Matematiko translimen* kaj certagrade en *Eŭropa dokumentaro* kaj *Scienca mondo* povus esti faskigitaj.

Rob Vetter (Nederlando)

Mesaĝo kiu ne malaktualiĝas

Naŭ jaroj en la Infero, de Naĉo Kemalov. Trad. el la bulgara Ivan Kovaĉev. Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1980. 111p. 20cm. ISBN 963 571 072 0. Prezo: 10,20 gld.

En 1937 Naĉo Kemalov, bulgara komunisto, estis survoje al Madrido por partopreni en la kontraŭ-frankista milito. Sed gestapanoj arestis lin en Kolonjo kaj li pasigis naŭ jarojn en la fifama koncentrejo Sachsenhausen. Ĉi tiu raporto pri liaj suferoplenaj spertoj apenaŭ havas ion novan por historiistoj; sed, ĉu la mesaĝo el la koncentrejoj iam malaktualiĝos?

La libro bone ilustras ĉapitron el unu el la plej pensovekaj verkoj de tiu kategorio. La aŭstra judo, kiu nun

nomas sin Jean Améry, postvivinto de Auschwitz kaj mem agnostika intelektulo, trovis, ke la pensmaniero de tipaj intelektuloj kontribuis al ilia pereco en la barbara mondo kreita de la nazioj. Aliflanke, homoj kun firma kredo, ĉu religia ĉu politika, fiksis sian rigardon sur ia fora celo kaj povis mense kaj fizike kontraŭbatali la inferan realon, kiu senkompate superfortis la nekredantojn. Eĉ sub mortiga torturo Kemalov rifuzis cedi; ĉe sia liberiĝo en 1945 li "konsistis nur el haŭto kaj ostoj". Neniu leganto dubos, ke li postvivis dank' al sia rokfirma politika kredo kaj la subteno de siaj kamaradoj.

Kvankam li forte admiris la kredantojn, Améry trovis la enhavon de iliaj kredoj nealloga por homo, kiu celas plejan objektiveton kaj universalecon en siaj juĝoj. Ankaŭ tiun flankon de la problemo la libro de Kemalov ilustras. Li deklaras, ekzemple, ke ĉiuj policistoj de la "burĝaj" ŝtatoj neniel diferencas inter si — egale ĉu ili laboras por gestapo de Hitler aŭ por Ĉeĥoslovakio de Masaryk — malgraŭ tio, ke lia propra rakonto klare pravas la malon. Entute la persono Kemalov ne reliefiĝas, li vidas ĉion tra ideologia prismo. Sed eble tio estis la fonto de lia rezistopovo, do kiu rajtas ĝin kondamni?

La traduko legiĝas plejparte flue, sed foje ĝenas la apudeco de *as-* kaj *is-*tensoj en la sama propozicio, kiam la senco klare postulas samtensecon (ĉu imite al la bulgara originalo?). Groteska eraro estas *punito* por homo ankoraŭ submetota al sadisma fitraktado.

Trevor Steele (Aŭstralio)


Robaĵoj de Kajam, Fitzgerald kaj Auld

La robaĵoj / The Rubáiyát, de Omar Kajam (1040?-1123?). Laŭ la elpersigo de E. Fitzgerald, el la angla trad. William Auld (1924-). Glasgow: Eldonejo Kardo, 1980. 51p. Ilus. de Jean Bomford. 21cm. ISBN 0 905149 14 9. Prezo: 16,50 gld.

La persaj lingvo kaj literaturo estas nur malmultege konataj en Eŭropo kaj Ameriko. Eĉ la kleruloj, kun la raraj esceptoj de la fakuloj, konas apenaŭ la nomojn de la plej elstaraj persaj poetoj, sed neniel iliajn verkojn. Ekzistas grava poeto, kiu trovis vastan legantaron ankaŭ en okcidentaj landoj: Omar' Kajam'.

Ŝajnas, ke pluraj favoraj cirkonstancoj kune efikis, ke li fariĝis tiom populara. Li trovis talentan tradukiston, kies genio evidente iel respondis al la lia: Edward Fitzgerald (1809-1883). Kaj tamen li eble restus ne atentata, se la poetoj Dante Gabriel Rossetti (1828-1882) kaj Algernon Charles Swinburne (1837-1909) ne estus entuziasmiĝintaj pri li kaj popularigintaj lin. La poemataro de Kajam' ne estas tro ampleksa. Temas pri entute proksimume 600 versokvaroj, laŭ enhavo sendepende memstaraj, epigramsimilaj poemetoj

(robajoj), el kiuj tamen nur 252 povas esti rigardataj kun ioma certeco kiel aŭtentikaj. Fitzgerald unue nur elektis por sia traduko 75 robajojn (1859). Kvankam en posta eldono de sia libro li aldonis ankoraŭ 25 robajojn, rezultis nur maldika libro, kiun oni eĉ ne bezonas sisteme legi de la komenco ĝis la fino.



La granda klerulo, matematikisto kaj astronomo Kajam' estas klara kaj konciza. Li uzas la tradician serenon Anakreonan formon plenigante ĝin per profundaj filozofiaj ideoj kaj tiel kreas brile facetitajn unuopajn artaĵojn de surpriza spirita beleco. Li meditas pri la pasemo kaj fragileco de la homa ekzistado, pri la senceco de la kruele reganta destino. Li ŝercas pri la malperfekteco de la homo. La gamo de liaj ideoj skalas de hedonista vivoĝuo, de Epikura celado al plezuroj kaj de frivola libertinismo ĝis sopira melankolio kaj mistika pesimismo. La robajoj impresas nin, hodiaŭajn legantojn, per racia skeptikismo, per la kontraŭeco al ĉiu dogmismo, per okaze supebla ateismo kaj rifuzo de ĉiuj tro facilaj, tro simplaj, tro praktikaj solvoj por la problemoj de la homa ekzistado. Nun estas atentinde, ke la esperantigo de William Auld baziĝas sur la angla teksto de Fitzgerald, kiu liveris, se mi ĝuste komprenas liajn vortojn, kiujn Auld citas en la unua paragrafo de sia enkonduko, pli ĝuste version ol tradukon. La germana poeto Friedrich Rosen, kiu publikigis en 1909 sur la originalo bazitan tradukon, diras pri Fitzgerald, ke "multe pli bone (ol la germanaj tradukintoj A. von Schack, 1878, kaj Friedrich Bodenstein, 1881) Fitzgerald esprimis la spiriton de la persa poeziaĵo, kune kun la karakteriza formo, kvankam lia verko, kiel tre senĝena transversigo, ofte anstataŭigas persajn pensojn per anglaj". Traduko el iu lingvo en alian jam estas tikla afero, des pli dufoja traduko kiel la priparolata. Nu, Auld ne bezonas timi la komparon. Li publikigis, kune kun sia traduko, la por li kvazaŭ originalan tekston de Fitzgerald.

Robajo, laŭ la difino en *PIV*, estas poezia termino, kiu signifas fiksforman poemeton de persa deveno, konsistantan el versokvaro, en kiu la unua, dua kaj lasta versoj rimiĝas. Tiun formon Fitzgerald kaj, laŭ li, ankaŭ Auld konservis. Ni rigardu, ekzemple, la robajon n-ro 27:

Avide, kiam juna, mi frekventis
Doktulojn, kiuj lerte argumentis
Ĉirkaŭ la temo: sed por mi eterne
Eniro kaj eliro nur identis.

La reprodukto kaj de la enhavo kaj de la originala spirito estas perfekta. La licencoj, kiujn Auld permesis al si, koncernas la formon: anstataŭigo de la viraj rimoj per inaj kaj la akcentŝanĝo de la vorto "ĉirkaŭ" je la komenco de la tria verso (kvankam tion oni facile povus eviti, dirante "pri tiu" aŭ prefere "pri iu" anstataŭ "ĉirkaŭ la"). Legante Fitzgerald aŭ Auld, ni ne forgesu, ke, tiel, kun Omar' Kajam' ni apenaŭ konatiĝis, kio ne ekskluzivas, ke ni povas plene ĝui, kion liaj "perfiduloj" al ni prezentas.

La glasgovan eldonon ornamas ses desegnoj de Jean Bomford, kiuj kune kun la kovrilo elvokas ian persan atmosferon. Antaŭ mi kuŝas du lukse aranĝitaj eldonoj de la robajoj. La unua (1949), trilingva, enhavas cent robajojn kaj kvindek tutpaĝajn kolorajn platojn kaj grandan kvanton da belaj vinjetoj, la dua (1955), kvarlingva, enhavas 75 robajojn, ĉiu akompanata de multakolora miniaturo. Estos ankoraŭ longa vojo, ĝis ni havos en Esperanto tiajn eldonojn kaj konforme aĉeteman bibliofilan publikon. Ĝis tiam ni almenaŭ zorge kulturu, kion ni jam atingis.

Rikardo Ŝulco (FR Germanio)

REDAKCIA NOTO: La recenzo de R. Schulz en sia origina formo estis duoble pli ampleksa kaj faris interesajn komparojn de diversaj nacilingvaj tradukoj de *Robajoj*. Tamen, ĝi tute ne menciis la antaŭajn Esperantajn tradukojn de la sama verko, tiun de C.M. Bean (1952, surbaze de Fitzgerald), kaj precipe tiun de G. Waringhien, eldonitan en 1953 sub la titolo *Poemoj* kaj faritan laŭ la persa originalo. Krome, antaŭ la revolucio en Irano ekzistis tie sufiĉe progresinta projekto eldoni luksan plurlingvan (ankaŭ kun Esperanto) volumon de Kajam. Ni nun ne scias, ĉu tiu projekto iam realiĝos.

Agrabla stilo de Ueyama

Mi amas . . ., de Masao Ueyama. Kioto: L'Omnibuso, 1977; 100p. Ilus. 19cm. Prezo: 11,70 gld.

Havas sian specialan ĉarmon legado de aŭtobiografiaĵoj, kaj se temas pri fora lando, tio aldonas kroman ĉarmon. Du bonaj kialoj por konsili, ke oni legu tiun ĉi libreton.

Ueyama posedas stilon agrablan kaj scias rakonti la malgravaĵojn de la vivo: pri sia junaĝo, sed ankaŭ pri postaj tempoj. Enestas eĉ la kutima fi-besto esperantisma: la parazito, kiu ja ankaŭ lin foje plagis.

Kvankam mi tion ne atendis, li sen prudo tuŝas eĉ la seksan flankon de la vivo, kutime tre delikate, sed unufoje lia esprimo ŝokis min kiel senkiale kruda (paĝ. 23). La lombardistaj aventuroj verŝajne estas pli rakontindaj ol spertindaj.

Mi diris ke la stilo estas agrabla, kvankam li mem "kap- tante nur angulon de Esperanto" opinias la lingvon tamen malfacila. Pri vortoj li estas — en prozo! — vere malavara: plurajn mi dum legado lernis! Tamen, mia- opinie Ueyama foje iom eraras lingve: paĝ. 46 unu *ne* troas. Kaj kial uzi *ekspekti* apud *atendi* sen distingo je signifo?

Verkante pri la japana vivo, kompreneble, li foje uzas (tre ŝpareme) japandevenajn terminojn. Fina glosaro helpas pri nekonataĵoj. Preseraroj estas iom tro oftaj, kvankam ne vere ĝenaj. Kaj la ilustraĵoj de Eizo Saito estas belegaj.

Isai Sumber (Nederlando)

Brazila lernila fasko

Aŭdu kaj lernu 1, de Sylla Chaves (1929-). Rio de Janeiro: Fundação Getúlio Vargas/Brazila Esperanto-Ligo, 1980. 136p. Ilus. 21cm. Prezo: 9,90 gld.

Nova amiko inter ni, de S. Chaves. Rio de Janeiro: Brazila E-Ligo, 1980, Ilus. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Frazoj kaj kantoj por komencantoj, de S. Chaves. Rio de Janeiro: Brazila E-Ligo, 1981 (ne indikita). Kaseto, akompane al la lernolibro *Aŭdu kaj lernu 1*. Prezo: 24,00 gld.

La alfabeto de Esperanto kaj facilaj frazoj, de S. Chaves. Rio de Janeiro: Brazila E-Ligo, 1980. 33 t/m. 18cm. Gramofondisko. Kantas J. de Castro k.a. Prezo: 6,00 gld.

Kiel vi jam povis legi aliloke en ĉi tiu revuo, okaze de la 66a UK, tie ekfloris kursa agado: grupe, skribe, per radio kaj verŝajne per televido. Preskaŭ ĉio surbaze de novaj lernomaterialoj kreitaj de Sylla Chaves. Prefere mi resumu la ecojn de la nun haveblaj materialoj:

Aŭdu kaj lernu 1 (AL1): Bone gradigita lernolibro por portugallingvanoj (500 radikoj). Ankaŭ por mem- lernantoj. Ne uzebla sen NA. *Nova amiko inter ni* (NA): Legotekstoj, preparaj legaĵoj, kantoj, poemoj. Uzebla internacie kun helpo de instruisto (1000 radikoj). *Frazoj kaj kantoj por komencantoj* (FkK) (tio estas kaseto *Aŭdu kaj lernu 1*, n-ro 6; kasetoj 1-5 estas la radio-kurso por portugallingvanoj). Ĉi tiu kaseto estas bone uzebla internacie (nur en Esperanto). Ĝi inkluzivas la enhavon de la diskoj "La alfabeto de Esperanto" kaj "Kantu kaj lernu", sed entenas pliajn legaĵojn kaj kantojn. *La alfabeto de Esperanto* (AE): Disko enhavanta 40 frazojn (prononcekzemplojn) kaj tri didaktikajn kantetojn. Ĝi estas apenaŭ uzebla ekster la kadro de kurso per NA.

Krome, ekzistas la diskoj: *Kantu kaj lernu*, *Karnavalo en Rio* kaj *Estis pli bona tempo*, kaj la kasetoj *Karnavale* kaj *Plurnacia bukedo*, kiuj enhavas kantojn uzatajn en la kurso. Pri tiuj aperis aŭ aperos apartaj recenzoj, ĉar ili estas bone uzeblaj ankaŭ ekster la kurso. La kasetoj *Frazoj kaj kantoj* kaj *Plurnacia bukedo* kune enhavas ĉiujn kantojn de NA.

La libro *Aŭdu kaj lernu 1* estas baza kurso por portu- gallingvanoj. Necesas samtempe uzi la libron *Nova*

amiko, ĉar en tiu troviĝas la legotekstoj ktp. Kaj pre- fere oni uzu la sonmaterialon: kasetojn aŭ diskojn. Por ne-portugallingvanoj eblas utiligi ĉion escepte la libron AL1. La klarigojn entenatajn en ĝi tiuokaze devas prezenti la instruisto. Li aŭ ŝi bone observu la konsilojn prezentitajn en NA, ĉar necesas salti tien kaj reen inter la diversaj teksto-specoj, por ke la kurso disvolviĝu ĝuste gradigite.

La kvanto de la lerno-elementoj (vortoj, strukturoj, gramatikaĵoj) en ĉiu leciono ne estas tro granda. La legotekstoj estas sufiĉe interesokaptaj kaj la kantoj certe plivigligas la lecionojn kaj plifaciligas la parkeri- gadon. Prave la aŭtoro utiligas la regulajn trajtojn de la lingvo kaj ne timas enkonduki prefiksojn kaj sufik- sojn jam en la baza kurso. Ja ĝuste ili ebligas liberan vortformadon, kiu tiel riĉigas la esprimkapablon de komencintoj! La uzata vortlisto estas ellaborita laŭ la "Baza radikaro", sed kun prudento.



Prononco: Kvankam AL1 bone avertas kontraŭ brazil- ismoj kaj Portugalismoj en prononco, en la frazoj de AE mi tro ofte aŭdis ekzemple i anstataŭ e kaj u anstataŭ o, dum diversloke iuj vokaloj prononciĝas nazale. Tial AE, se sola, ne estas perfekta prononc- helpilo. En la kantoj foje okazas io simila, sed tie tio malpli ĝenas.

Kelkaj rimarkoj pri *Aŭdu kaj lernu 1*: Paĝo 32: Ĉu vere "sinjoroj" inkluzivas la sinjorinojn? Mi aŭdis foje, ke oni diras "lernantoj" por "gelnantoj" kaj "kurs- anoj" por "gekursanoj" (-ant- kaj -an- ja povas signifi: iu, kiu...), sed mi neniam aŭdis "viroj", "knaboj", "sinjoroj" por ambaŭ seksoj! Paĝoj 30/34: Lecionoj 7 kaj 8 erare kredigas, ke -i sin kaj -iĝi estas sinonimaj. La ŝlosilo de tradukekzerco en leciono 7 prave donas "la suno leviĝas", sed la lernanto skribos "levas sin", ĉar -iĝ- aperas nur en leciono 8... Paĝo 44: Ne estas vere, ke "preskaŭ nur en poezio" oni komencas frazon per la objekto. Similan kritikon renkontos iuj aliaj (nenecesaj) komentoj.

Wouter F. Pilger (Nederlando)

Poezio peras eseajojn

El unu verda vivo, de William Auld (1924-). Kuopio: Lingvoponto, 1978. 44p. 21cm. Prezo: 5,70 gld.

Ĉi tiu poemkolekto de William Auld konsistas el versaĵoj verkitaj por diversspecaj okazoj. Ilin pli kunligas — mi dirus — la graveco de la enhava flanko ol la forma: ĉi tie poezio nur peras kaj alloge vestas eseajojn, leteraĵojn, eĉ spritaĵojn. Efektive, rigidaj poeziformoj nuntempe plutaŭgas nur por enhavo tia. Eble ĝuste tion la aŭtoro al ni volas instrui per sia majstra utiligo de stanco kaj similaĵoj.

En ĉi tiu poemaro oni lernu, interalie, honestecon: flanke de poemo priskribanta la avantaĝojn de Esperanto kiel solvo de la monda lingvo-problemo, oni trovas timigan skizon pri la nuna stato de la homaro kaj plensinceran konfeson pri la mallaboremo de la aŭtoro. Mi celas jenon: Auld neniel klopodas iluzii nin, ke "verda vivo" estas glata samkiel ia klubaneco. Esperantisto loĝadas en kulposenta pensaro, en nedecidemo, en la konflikto-krea neceso forŝteli de siaj vivigaj okupoj minuton post minuto, se li/ŝi volas iel "verde" vivi. Triumfantaj stelegoj kaj bombastaj taskonomoj en kvinpersonaj klubejoj neniel progresigas la aferon kaj la homon. Kaj homo ĉiam centras ĉe la poeziaj streboj de Auld.

Jen poemaro por esperantistoj. Nura parolanto de Esperanto ne komprenus ĉiujn aludojn en ĝi. Ĝi konsistas el movado samkiel el lingvo: mi forte dubas ĉu ekzistas nacilingvo tiom nature nuancoriĉa kiom postulus altraduko el "unu verda vivo". **Giulio Cappa (Italio)**

Por pli funde koni sin kaj la aliajn

Kiel personeco sin strukturas, de Claude Piron (1931-). Liège: Someraj Universitataj Kursoj, 1978. 8+108p., 30cm. Prezo: 21,00 gld.

"Meti ordon en la nuna teoria kaoso", tiu frazo bone resumas ĉi tiun libron kaj povas trafi la intencon de la aŭtoro. Ja ĉiu studanto pri psikologio, precipe en la komenco, spertas la amaran senton de homo perdiĝinta en ĝangalo. La aŭtoro konscias pri tiu malhelpo kaj celas, tra la tuta kursolibro, doni klaran gvidilon por esplori la kamp(ar)on (la herboriĉan, kun floroj kaj birdoj, kaj la ŝlime marĉan) de personeco. Li liveras, kiel kompason, la teorion de Charles Baudouin, kiu provas esti, kiel eble plej, ne nur sinteza rilate la diversiajn elementojn konsistigantajn personecon, sed ankaŭ dinamika dank'al integriĝa procezo.

Tia sinteno ebligas retrovi kaj adapti konceptojn de la teorioj de Freud kaj Jung, ankaŭ de Adler (komplekso de malplivaloro). Se al tio aldoniĝas elementoj el la teorio de Piaget (memcentreco, simbola menskapablo, dinamiko inter asimilado kaj alkonformiĝo), tiam ni

havos pli da ŝancoj ne maltrafi tiun tutaĵon nomatan personeco, kaj ni pli bone komprenos la mekanismojn, kiuj faras ĝin "strukturo el strukturoj" (p.78).

La koncepton de strukturo bone priskribas la aŭtoro (p. 6-7), kaj lia paŝo-post-paŝa analizo malvolvas la elementojn (la 6 instancojn), sed samtempe helpas rekonstrui, laŭ dialektika procezo, la tutaĵon. Tiel reliefigas la aktiva formo de la verbo kaj la refleksiva pronomo en la titolo, tie kuŝas meta-psikologia postulato. Alie estus kun jena titolo: "Kiel personeco estas strukturita", kiu pli konformas kun la behaviorista aŭ pavlova skoloj en la psikologio.

Ĉi-rilate mi bedaŭras la foreston (krom aludo p. 61) de karakterologio (precipe laŭ la nederlanda-franca skolo), kiu helpas kompreni, kial personeco sin strukturas tiel kaj ne alie. Ni tamen ne forgesu, ke la kursodaŭro ne ebligas ĉion diri, cetere la aŭtoro jam avertis: "Ni ĉi tie ne resumos la ĉefajn teoriojn pri personecformiĝo" (p. 5).

Kio faras la libron vere interesa, estas la svarmo de psikologiaĵoj de la ĉiutaga vivo (Vd. indekson): fumado, televido, drogoj, rasismo, rukto (p. 53), Asteriks (p. 88), svisa kaj japana horloĝriparistoj (p. 52), priseksaj aferoj. Ankaŭ estas aludoj priesperantaj. Malpli kompreneblaj, laŭ mia laŭdire okcidentisma malklereco, estas la aludoj al astrologio, eĉ se "tradicia" (p. 9). Multaj paĝoj estas tute atentokaptaj: la longa ĉapitro pri la "egoo", ankaŭ la "Misrezonaj procezoj" (p. 60), la konfliktoj (p. 78-80). Ni notu kelkajn trafajn esprimojn: "eso, rolulo, ombro", "aserti sin", "lerneji" (p. 65), "vicmama objekto". Tamen, ĉu "provkontakto penvaloras" (p. 21) devas estas komprenata kiel "kontaktoprovo valoras penon"?

Sume, ĉi tiu libro estas konsilenda al studentoj pri psikologio pro sia enhavo, siaj glosaro kaj bibliografio (mi tamen hezitus konsili Debray-Ritzen al ne avertitaj legantoj. Kial nur unu titolo de Wallon, kaj neniu de la sovetia pripsikologia skolo?). Ĝi interese ankaŭ ĉiujn, instruistojn, vartistojn, kuracistojn, kies laboro rilatas kun infanoj aŭ adoleskantoj, kaj — fine — ĉiujn, kiuj celas pli funde koni sin kaj la aliajn homojn.

Roberto Lloancy (Francio)

Se vi mendas librojn ĉe UEA, pensu pri la sendokostoj: minimume 5,00 guldenoj; por mendoj sub 200 gld. 20 procentoj, por tiuj super 200 gld. 10 procentoj. Nederlandanoj memoru la imposton: por libroj 4, por aliaĵoj 18 procentoj. Dankon!

Almanako Lorenz 1981. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1981. 211p. Ilus. 21cm. Unua numero. Kolekto de diversspecaj informoj, artikoloj, poemoj, preĝoj k.s., precipe spiritismaj. Prezo: 9,90 gld.

Apologio de Sokrato kaj Kritono, Platono (427-347 a.K.). El la helena tradukis Albert Goodheir (1911 -). Glasgow: Kardo, 1981. 51p. 21cm. ISBN 0 905149 15 7. La defendo de Sokrato antaŭ akuzantoj, kaj unu el liaj famaj dialogoj. Prezo: 14,40 gld.

Baladoj el Asante / Ashanti Ballads, Ko Nimo. Laŭ la angla traduko de Joe Latham, el la lingvo turi parolata en Ganao, esperantigis Albert Goodheir (1911 -). Coatbridge: Kardo, 1981. 42p. 21cm. ISBN 0 905149 17 3. Trilingva eldono. Prezo: 6,00 gld.

Blagoj kanteblaj por plu-e. . . fiki; 30 kanteblaj blagoj kaj 50 mal-decaj anekdotoj, poemoj kaj aliaĵoj, Fikspronulo (pseŭd.). Sen eldonindikoj, 1981. 64p. Mimeo. 17cm. Prezo: 12,00 gld.

Dia komedio, La / La divina commedia (unua E-eldono 1963), Dante Alighieri (1265-1321). El la itala tradukis Giovanni Peterlongo (1856-1941). Milano: SIEI, 1979 (2a eld.). 55+709p. Ilus. 28cm. Serio Oriento-Okcidento. Tre luksa dulingva eldono, kun paralelaj tekstoj en Esperanto kaj la itala. Pli ol cent tutpaĝoj ilustraĵoj de Sandro Botticelli. Pluraj enkondukaj tekstoj, multaj klarigaj notoj. La monde konata ĉefverko de la granda itala poeto. Versa traduko, sen rimoj. Prezo: 69,00 gld.

EK-vortaro de matematikaj terminoj/EG-Wörterbuch mathematischer Begriffe, R. Hilgers kaj Yashovardhan. Alsbach: Leuchtturm-Verlag, 1980. 161p. 21cm. ISBN 3 88064 080 7. Matematikaj difinoj en Esperanto kaj terminaroj en ses lingvoj (angla, dana, franca, germana, itala, portugala) kun Esperantaj tradukoj. Prezo: 23,40 gld.

Energio, I. de Bruin-Kooij kaj A.J.F. de Wit. Almelo: FEN, 1981. 62p. Ilus. 21cm. Riĉa informa broŝuro pri la energikrizo en la mondo. Prezo: 6,00 gld.

Esperanto; curso elementar em 20 lições, Manuel S. Teixeira. Lisboa: Associação Portuguesa de Esperanto, 1980. 123p. Mimeo. 21 cm. Baza kurso. Prezo: 4,80 gld.

Fabeloj de la verda pigo, Louis Beaucaire (1925 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1981. 110p. Ilustris Stano Markovič. 21cm. ISBN 90 6336 20 7. Spritaj fantaziaj rakontoj kun Esperantaj temoj, verkitaj de unu el la plej popularaj originalaj prozistoj (*Kruko kaj Baniko el Bervalo*, 1970 kaj 1974; *El la vivo de bervalo sentaŭgulo*, 1974). Prezo: 19,80 gld.

Fundamenta Esperanto sen supersignoj, Björn Collinder (1894 -) kaj Vilho Setälä (1892 -). Helsinki: Setälä, 1980. 18p. 21cm. Ortografia reformprojekto. Prezo: 3,30 gld.

Gardu la pacon!, Asen Grigorov (1903). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1980. 119p. 19cm. ISBN 963 571 067 4. Versaĵoj originalaj kaj el la bulgara tradukitaj. Prezo: 10,80 gld.

Infero, Dante Alighieri (1265-1321). El la itala tradukis (1933) K. Kalocsay (1891-1976). La Chaux-de-Fonds/Milano: Literatura Foiro, 1979 (2a eld.). 282p. Ilus. 23cm. La unua parto de la klasika verko *Dia komedio*, tradukita versforme, kun postparolo de G. Waringhien. Prezo: broŝurite 36,90; bindite 51,00 gld.

Juda saĝo. Kompilis Sigvard Feldbaum. El la sveda tradukis Leif Gunnar Karlsson (1960 -). Aarhus: Dana Esperanto-Eldonejo, 1980. 52p. Ilus. 20cm. ISBN 87 85020 99 0. Kolekto de judaj aforismoj. Prezo: 7,20 gld.

Kvintesenco, A. Lopez Luna (1914 -). Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1981. 102p. Mimeo. 17cm. Resume prezentas la ideojn el la pli fruaj verkoj de la aŭtoro. Prezo: 4,20 gld.

Listo de gastigantoj 1981, Pasporta Servo de TEJO. Pisa: Edistudio, 1981. 36p. Ilus. Mapoj. 21cm. Prezo: 9,00 gld.

Litomiŝla tombejo, La, Karolo Pič (1920 -). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1981. 276p. 20cm. Romano originale verkita en Esperanto. Kun aŭtobiografia, foje movada, fono. Forme eksperimenta, lingve ekstravaganca. Prezo: 44,10 gld.

. . . már tudom, mi az eszperantó!, Jozefo Horváth. Budapest: Magyar Eszperantó Szövetség, 1981. 63p. Ilus. 24cm. ISBN 963 571 074 7. Hungarlingva. Bazaj faktoj pri la Esperantaj lingvo kaj movado. Amuze ilustrita. Prezo: 3,00 gld.

Mia spirita pilgrimado (1978), Niranjan Nath Kaul (1935 -). El la angla tr. Albert Goodheir. Morecambe: Kvakera Esperantista Societo, 1980. 8p. 16cm. Lampiro 5. Prezo: 1,80 gld.

Miscellanea interlinguistica / Interlingvistika antologio. Redaktis István Szerdahelyi. Budapest: Tankönyvkiadó, 1980. 513p. Mimeo. 24cm. Plurlingva, plejparte Esperanta. Trideko da artikoloj de tiom da aŭtoroj diverslandaj pri aplika lingvistiko, esperantologio kaj interlingvistiko. Prezo: 24,00 gld.

Mondo de travivaĵoj, Tibor Sekelj (1912 -). Pizo: Edistudio, 1981. 286p. Ilus 21cm. Rakontoj pri aventuroj de la verkinto dum vojaĝoj tra ekzotikaj landoj en kvin kontinentoj. Flua kaj facila stilo. Prezo: 24,00 gld.

Naciismo kaj esperantismo, S. Aarse (1900 -). Laroque Timbaut: Broŝurservo de SAT, 1981. 73p. Mimeo. 21cm. Prezo: 3,00 gld.

Nezha kirlas la maron, Shanghai-a Belarta Studio. Beijing: El Popola Ĉinio, 1980. 80p. Ilus. Adaptaĵo de kolora desegnofilmo bazita sur ĉina legendo el Ming-dinastio. 88-Es-173P. Prezo: 6,00 gld.

Nia individuismo, ĝiaj depostuloj kaj tezoj per demandoj kaj respondoj, E. Armand. Esperantigis D.C. Laroque Timbaut: Broŝurservo de SAT, 1981. 28p. Mimeo. 21cm. Prezo: 2,40 gld.

Planlingvo Esperanto, Irja Klemola (1897 -). Turku: E-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, 1980. 136p. 21cm. Lernolibro kun ekzercoj, legaĵoj kaj vortareto. ISBN 951 99272 1 2. Prezo: 22,20 gld.

Pri Jugoslavio, Igor Graovac kaj Mario Nobilo. Trad. el la kroata Roger Imbert (1938 -). Zagreb: Kroatia Esperanto-Ligo, 1980. 64p. 20cm. Prezo: 4,50 gld.

Proposte; Traduzioni guidate in esperanto, Carlo Minnaja (1940 -). Verono: Istituto Italiano di Esperanto, 1979. Gradigitaj tradukekzercoj el la itala en Esperanton. Prezo: 12,00 gld.

Sesdek jaroj kun Aldonaj konsideroj, Pietro Rizzo (1907 -). Edistudio: Pizo, 1979/1980. 39+12p. 24cm. Aŭtobiografiaj movadaj rakontoj kaj lingvaj notoj. Prezo: 6,00 gld.

Skizo pri Ĉinio. Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 100p. Ilus. 19cm. Kun mapo. 17-Es-1504P. Superrigardo pri la geografio, historio, politiko, ekonomio kaj kulturo de Ĉinio. Prezo: 3,60 gld.

Somermeze (1966), Paul Kuusberg (1916 -). El la estona tradukis Alma Lekko. Tallinn: Eesti Raamat, 1981. 358p. Ilus. 17cm. Militromano, multilate aŭtobiografia, pri maturiĝo de la mond-percepto ĉe juna ĉefrolanto. Kuusberg apartenas al la plej elstaraj nuntempaj estonaj verkistoj. Prezo: 13,80 gld.

Sur la vivopado, Nicolino Rossi (1939 -). La Chaux-de-Fonds/Milano: LF-Koop, 1980. 112p. 24cm. Originala poemaro de la ĉefa itala poeto en Esperanto. Prezo: 15,90 gld.

Tiel okazis... kaj aliaj rakontoj; el "Japanaj malnovaj rakontoj", Tubota Zyōzi. El la japana tradukis la membroj de "Ovo en Kovejo". Kumamoto: Kumamoto E-Grupo, 1980. 99p. Ilus. 21cm. Prezo: 8,10 gld.

Tridek roluloj, Stefan MacGill (1948 -). Antverpeno: TEJO, 1981. 72p. Ilus. 21cm. Kvin amuzaj skeĉoj kun ekzercoj kaj notoj por kursgvidantoj. ISBN 92 9017 023 9. Prezo: 8,10 gld.

Vole. . . novele; aŭ Kvindek jaroj da noveloj 1920-1970 (1971), Raymond Schwartz (1894-1973). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1981 (fotorepreso). 192p. 20cm. Duono de la volumo konsistas el represo de *Prozo ridetanta* (1928), kaj la alia duono el noveloj verkitaj poste. Entute 35 originalaj prozaĵoj interesokapte montas la arton de la fama Esperanta verkisto. Prezo: 24,00 gld.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto (1954), Hans Wingen. Hildesheim/New York: Georg Olms, 1981. 176p. 17cm. ISBN 3 487 07080 4. Prezo: 26,40 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj — 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj — 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

Strasburgo, la dua

”NOVAĴO por mi estis, ke oni finfine diskutis per Esperanto, kaj ne pri Esperanto. Mi spertis, ke tia ĉi memevidenta varbado pli efikas ol tiu kutima...”, diras Giuseppina Farbbrocino. Alia itala partoprenanto, Daniele Mistretta, emfazas la saman penson: ”Kontraŭe al la ĝenerala tendenco elekti primovadajn, pri lingvajn aŭ etnismajn temojn, ĉi-foje oni traktis ekonomion. Dum la tuta semajno oni pensis pri Esperanto nur kiam iu neesperantisto faris sian kontribuon al la laboro.”

Pri kio tiel entuziasmas la du junaj geitaloj? Temas pri la dua seminario de TEJO en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo (Francio), okazinta inter la 31a de majo kaj la 5a de junio 1981. La temo de la seminario estis la Nova Internacia Ekonomia Ordo. Kvan-kam tiu demando jam de pluraj jaroj ĉefrolas en multaj konferencoj kaj kunvenoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, ĝi ankoraŭ restas relative netraktita en la Esperanto-movado. Per la strasburga seminario TEJO volas kontribui al la lanĉo de tiutemaj diskutoj ankaŭ en la Esperanto-movado.

La seminarion organizis la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO, precipe Elisabeth Schwarzer, Barbara Despiney, Martin Haase kaj Paŭlo Hopkins. Gvidis Ulrich Bunjes, stabano de la Centro, kaj partoprenis dudeko da junaj esperantistoj. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de la pola sekcio de Internacia Studenta Movado de Unuiĝintaj Nacioj (ISMUN). La laborlingvo de la seminario estis Esperanto, sed oni samtempe tradukis en la germanan kaj foje en la anglan.



Sep jaroj egalas tutan generacion en la junulara Esperanto-movado. Tiel longe Ineke Emmelkamp (dekstre) prezidis en Nederlanda Esperanta Junularo. Fine de aprilo ĉi-jare floroj de la sekretario de NEJ, H. Diender, markis la dankon de la organizaĵo al sia multjara prezidantino. Nun NEJ denove havas prezidantinnon — Corine Cheizoo.

Prelegis s-ro Vu Tu Hoa, vjetnama ekonomikisto loĝanta en FR Germanio, s-ro Ronald Kingham, sekretario de Junularo por Nova Internacia Ordo, Barbara Despiney, pola ekonomikisto loĝanta en Francio, kaj Ulrich Bunjes de la Centro mem. Labor-grupoj aparte traktis la subtemojn Internaciaj Konzernoj (gvidis E. Schwarzer) kaj Monda Ekonomio (gvidis Zdravka Metz, kiu prezentis ankaŭ la sintenon de la nealiancitaj landoj al la Nova Internacia Ekonomia Ordo).

Tuta posttagmezo estis dediĉita al ”planludo” — aktuala metodo lerni pri la komplekseco de problemoj, travivante planitan similaĵon de la cirkonstancoj, kiuj povas sin prezenti en la vivo. La seminarianoj do dividiĝis en grupojn: registaro de industrilando, industrilanda konzerno, registaro de evolulando, kaj civitanoj de la industrilando. Ĉi tiuj luktis en ŝajnigita balotperiodo por la industrilanda registaro. El tiu fantaziado kaj improvizita aktorado venis pli klara kompreno pri la komplikaj premoj, kiuj pelis la Nordon kaj la Sudon al iliaj nunaj konfliktaĵoj pozicioj.



„Thespis” en Timișoara

JEN POZAS la membroj de la teatra trupo ”Thespis” el Timișoara, Rumanio. Ĉi tiu 20-persona amatora grupo ekzistas jam de multaj jaroj, ligite kun la junulara domo en Timișoara. Ekde la lasta jaro ili prezentas teatraĵojn ankaŭ en Esperanto. Tion pruvis 12 anoj el la trupo, kiuj altnivele prezentis la teatraĵon *Pureco de sango* de Bernard Golden, centre en la programo de la 6a Internacia Junulara Festivalo en Poretta Terme, Italio, meze de aprilo ĉi-jare. La trupo volas larĝigi sian Esperantan repertuaron kaj volonte ricevos bonajn dramo-tekstojn en la Internacia Lingvo: ”Thespis”, Casa Tineretului Timișoara, Str. Aries 19, R-1900 Timișoara.

150 festivalantoj ĝuis ne nur dramon spektaklon sed ankaŭ nekutime luksan festivalejon. La temo ĉi-jare estis ”Humuro” kaj pluraj studgrupoj kunvenadis longe por serioze okupiĝi pri tio. El tiuj grupoj fontis prezentoj de kelkaj originalaj skeĉoj kaj ankaŭ fragmentoj el teatraĵoj de Ionesco, Pinter k.a., kelkaj aparte tradukitaj por la Festivalo.

Unuiĝintaj Nacioj

- En la UN-centro en Vieno oni faras klopodojn fondi Esperanto-klubon kaj ekaktivi pri la Internacia Lingvo. Tie nun laboras la dana esperantisto Eskil Svane, kiu sisteme estis unu el la fondintoj de la Esperanto-klubo ĉe la sidejo de UN en Nov-Jorko.

Svedio

- Sepdek gejunuloj aliĝis al Esperanto-kursoj en la urboj Årjäng kaj Töcksfors. Temas pri lernejoj, kiuj studas la Internacian Lingvon en liberaj studrondoj ekster la oficiala programo. En Årjäng antaŭ kelkaj jaroj okazis kongreso de FREINET-pedagogio, kiun organizis Internacia Federacio de la Movadoj por Moderna Pedagogio, kaj kiu vekis intereson pri Esperanto. Oni opinias, ke ankaŭ la nuna multnombra partopreno en la kursoj estas postrikolto de la informa efiko de tiu pedagogia kongreso.

Kolombio

- Lastatempe okazis du televidaj elsendoj pri Esperanto en Kolombio — la 9an de marto kaj la 6an de aprilo. En la ĉefurbo de ĉi tiu sudamerika lando, Bogoto, nun funkcias kvar Esperanto-kursoj. En aprilo ĉi-jare denove komencis aperi informilo de Kolombia Esperanto-Ligo — *KEL-bulteno*, kiu raportas i.a. pri la preparoj por la 2a Tutamerika Kongreso de Esperanto, okazonta tie en julio 1982. Kolombianoj akceptos plurajn eŭropajn gastojn ĉi-jare: C. Nourmont-Moon (Luksemburgo), P. Schilperoord (Britio), G. Dehoux (Belgio), C. kaj A. Nicolodi (Svislando). Ĉiuj venos survoje al la 66a UK en Brazilo, kien ankaŭ KEL provas sendi grupon.

Israelo

- En la Junulara Centro de Tel-Avivo antaŭ nelonge finiĝis Esperanto-kurso, kiun gvidis s-roj Mašler kaj Murĵan. Tuj komenciĝis nova kurso, por kiu Esperanto-Ligo en Israelo faris bonan propagandon per afiŝoj kaj anoncoj en junulara gazeto. Krome, Esperanto-kursoj okazas en du lernejoj de Tel-Avivo.

Norvegio

- Norvega Esperantista Ligo aperigis sian jaran raporton pri 1980 en la dua ĉi-jara numero de *Norvega esperantisto*. La raporto fine emfazas, "ke estas klaraj signoj de kreskanta intereso por Esperanto en la socio: interalie per aliĝo de pluraj instruistoj profesiaj al nia instruista sekcio, per instruado de Esperanto en pluraj lernejoj kaj per pli proksima kunlaboro kun du el la ministerioj." (Temas pri la ministerioj de edukado kaj eksteraj rilatoj). Ankaŭ la membronombro de la Ligo kreskis dum 1980, post plurjara mala tendenco.

Kubo

- Ekde marto ĉi-jare, la urba radiostacio de Havano elsendas ĉiudimanĉe Esperanto-kurson. La lecionoj aperas samtage en unu el la ĉefurbaj ĵurnaloj. En aŭgusto, Kuba Esperanto-Asocio planas okazigi la unuan tutlandan Esperanto-Kongreson.

FR Germanio

- En Ruhr-Universitato en Bochum ĵus fondiĝis Universitata Esperanto-Grupo, kies prezidanto fariĝis Norbert Blundau (Am Langen Seil 95b, D-4630 Bochum 1). En kelkaj aliaj germanaj universitatoj jam ekzistas aktivaj studentaj Esperanto-grupoj.

Kenjo

- Al la adreso de UEA venas lastatempe sufiĉe multaj informpetoj pri Esperanto el Kenjo. Ili estas rezulto de anoncokampanjo en kelkaj kenjaj gazetoj. La kampanjon organizis Hans Bakker, UEA-komisiito pri Regiona Agado, kaj Ian Tarrant, antaŭa volontulo ĉe UEA, nun jam de du jaroj laboranta kiel instruisto en tiu orientafrika lando.

Italio

- Ni menciis pasintjare, ke d-rino Lina Gabrielli gvidis Esperanto-kursojn por tre granda grupo de instruistoj en la regiono de Ascoli Piceno. Tiaj kursoj okazas ankaŭ ĉi-jare, kun partopreno de tuta centoj da profesiaj pedagogoj. Krome, en Ascoli Piceno mem funkcias Esperanto-kurso en la mezlernejo "Luigi Luciani". D-rino Gabrielli evidente dediĉas multan tempon al la Internacia Lingvo en kiu ŝi ankaŭ rolas kiel fruktodona verkisto kaj unu el la plej agemaj eldonistoj.
- "Esperanto kaj Eŭropo" estos la ĉeftemo de la 52a Kongreso de Itala Esperanto-Federacio, okazonta en Romo inter la 19a kaj 24a de septembro ĉi-jare. La programo antaŭvidas organizon de "Eŭropa Tago", kun partopreno de ekstermovadaj funkciuloj kaj asocioj. Tre bonvenus ĉeesto de eksterlandanoj, pro kio la Kongreso (Via Monte Bianco 38, I-00141 Roma) pretas subvencii la partoprenon de gejunuloj el la landoj de Eŭropa Komunumo, el Hispanio kaj Portugalio.



- Islando:** Pasintjare la Esperanto-klubo "Norda Stelo" de Akureyri aranĝis imponan ekspozicion de la Esperanta literaturo. Verŝajne ankaŭ tiu ekspozicio kunhelpis, ke en la loka gimnazio 20 gelernantoj aliĝu al Esperanto-kurso, kiun finansas la lernejo mem. Lastatempe "Norda Stelo" komencis eldoni monatan bulteneton kaj akiris kunvenejon.



- **Brazilo:** Kiel krei lokajn sekciojn de **Brazila Esperantista Junulara Organizo**, tio estis la ĉefa demando pri kiu okupiĝis ĉirkaŭ sepdek gejunuloj dum la unua Tutlanda Esperantista Junulara Kunveno en Nova Friburgo apud Rio de Janeiro. Al la kunveno, kiu okazis inter la 17a kaj 19a de aprilo, venis kiel gasto ankaŭ d-ro V. Sadler (meze, kun mikrofono), kiu tiam estis en Brazilo.

Fake



jam donis permeson pri la Esperanta eldono. Tri suplementaj libretoj akompanos la libron kaj temos pri: gvido de la studado, laboratoriaj eksperimentoj, instruista manlibro (solvitaj problemoj). La traduko, kiu vole-nevole normigos la kemian nomenklaturon en Esperanto, estos zorge kontrolita, unue en Usono, poste en Japanio, Hungario kaj Urugvajo. Oni antaŭvidas, ke la traduklaboro estos preta en marto 1983. La projekton gvidas inĝ. R. Kent Jones, UEA-fakdelegito en Ĉikago.

Filatelo

- Kiel jam anoncite, la brazila poŝto honoros la 66an Universalan Kongreson de Esperanto per speciala poŝtmarko. Ni sukcesis akiri foton de la nova Esperanta filatelaĵo (vidu ĉi-supre). Kvankam ni ne scias ion pri la koloroj de la poŝtmarko, ni kuraĝas supozi, ke la granda stelo en ĝia mezo estos — verda. La poŝtmarko estos lanĉita en speciala ceremonio komence de la kongresa semajno en la brazila ĉefurbo.

Kemio

- Responde al la premo de la nova Esperanto-movado en Irano, Esperanto-Societo de Ĉikago (Usono) kaj kelkaj membroj de la landa asocio ELNA entreprenas la tradukadon de la kemia lernolibro *Generala, organika kaj bio-kemio*. La 450-paĝan lernolibron eldonis ĉi-jare la usona eldonejo Scott, Foresman & K-io, kiu

Invalidoj

- Okaze de la Internacia Jaro de Handikapuloj — 1981, s-ro Dušan Adnadj (Školska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio) provas fondi movadan invalidan organizaĵon. Skribu aldonante respondkuponon.

Informado

- *La historio kaj la ideo de lingvo internacia* estas 260-paĝa libro de Kozo Futataugi aperinta meze de majo en 5000 ekzempleroj. Ĉi tiu informa japanlingva verko estas eldonita de *Mainichi Shimbun*, unu el la plej grandaj japanaj ĵurnaloj kun eldonkvanto de pli ol 4 milionoj da ekzempleroj. Kvankam la titolo sugestas pli ĝeneralan interlingvistikan gvidilon, la verko ĉefe okupiĝas pri Esperanto.

Teatro

- Kvankam UEA spertas problemojn por organizi teatran vesperon en la 66a UK, teatra arto floras en la Movado (vidu la paĝon 113). Fine de novembro ĉi-jare, inter la 27a kaj 30a, Kroatia Esperanto-Ligo anoncas la 2an Renkontiĝon de Esperanto-Teatroj, en la marborda urbo Pula, en Jugoslavio. Oni antaŭvidas la partoprenon de deko da teatraj trupoj profesiaj kaj amatoraj. Samtempe estas planita junulara renkontiĝo por 200 ĝis 300 personoj. Teatraj trupoj povas aliĝi ĝis la 5a de septembro, kaj aliaj partoprenantoj ĝis la fino de oktobro ĉe: Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Persone

Isobe

- S-ino Yukiko Isobe, ĉefdirektoro de Japana Esperanto-Instituto kaj komitatano de UEA, estas verŝajne la plej vojaĝema movadano. Fine de 1980 ŝi estis denove en Ĉinio, en januaro ĉi-jare Isobe vizitis Usonon, en februaro sekvis Brazilo, en marto denove Usonon, en aprilo ŝi venis al Eŭropo. En Roterdamo Isobe traktis kelkajn movadajn aktualaĵojn en la Centra Oficejo, por poste "salti" al Antverpeno lige al la venontjara Universala Kongreso tie. Komence de majo Isobe estis en la Germana Esperanto-Kongreso, de kie — ŝi almenaŭ promesis tion — ŝi reiris al

Japanio kaj restis tie ĝis la fino de majo, por iom ripozi antaŭ novaj vojaĝoj. Kompreneble, Isobe ne povas manki en la ĉi-jara Kongreso en Brazilo.


Schilperoord

- Laŭ *Bulteno* de Londona Esperanto-Klubo, Peter Schilperoord pasigos tri monatojn prelegvojaĝante en Azio kaj Suda Ameriko. Schilperoord, nederlandano delonge vivanta en Britio, estas entreprenema movada eldonisto al kiu ŝuldiĝas la apero de disko kaj pluraj kasetoj, inter kiuj ankaŭ la radio-kurso *Jen nia mondo* de J.C. Wells. La vojaĝo kondukos

Schilperoord tra Koreo, Japanio kaj Kolombio al la 66a UK en Brazilio.

Mitterrand

• La nova prezidento de Francio, François Mitterrand, antaŭ la majaj elektoj skribis al SAT-Amikaro i.a. jenon: "Mi permesas al mi precizigi al vi, ke miaj parlamentaj amikoj, en la antaŭa sesio de la Nacia Asembleo, submetis leĝproponon, kiu celis inkluzivigi la Internacian Lingvon Esperanto en la duagradan edukadon kaj superan instruadon, kiel laŭvolan lingvon. Se la francoj metos sian



fidon en min, mi petos al la registaro submeti tiun leĝproponon al la parlamento."

Oficiala Informilo

N-ro 545

NOVA ĈEFDELEGITO POR ISRAELO

Post la retiriĝo de la antaŭa Peranto por Israelo, estas ĵus nomita unuafoje por tiu lando Ĉefdelegito. Temas pri s-ro Jehoŝua Tilleman, 40 Ŝivtej-Jisrael-str., IL-26 275 Kirjat-Hajim; tel. (04) 70 48 48. Membroj en Israelo bonvolu turni sin al li por pagi kotizojn kaj pri delegitaj aferoj. UEA kore dankas al s-ino Raja Kleiman, kiu funkciis kiel peranto dum la lastaj du jaroj.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Svislando: Konrad Rey-Zollinger.

SOCIETO ZAMENHOF 1981

ARG: 145 Luis Martinez Ungria; 146 Curt Milkuschutz; 147 Bruno Ostropolski; 148 Guido Alberto Schwarz. BELG: 149 Cl. Peeters. BRIT: 150 Wilfrid G. Atkinson; 151 Kenneth A. Sly; 152 A.W. Thomson. FRANC: 153 François Lo Jacomo. FR GERM: 154 Helmut Klünder; 155 Heinz Schindler. HISP: 156 Josep Castelltort i Riba. ITAL: 157 Michele Mariano. JAP: 158 Saburo Yamazoe. NED: 159 B. Kappert; 160 A.M.E. van Walsem-Schutte. SVED: 161 Anna Ericson; 162 Astrid Feuk; 163 David Kullberg; 164 K.G.L. Lagerkrantz; 165 Edla Nilsson; 166 Martin Säter. SVISL: 167 Florence Cool-Côté. US: 168 Milton O. Brown; 169 William W. Glenney; 170 Thomas H. Goodman; 171 Gigi Harabagiu; 172 Moshe Lewin; 173 Daniel L. Mason; 174 W. Campbell Nelson; 175 James Parker-

son; 176 Jonathan Pool; 177 George Rodenborn; 178 Bruce Arne Sherwood; 179 Robert A. Swenson; 180 Eugene H. Thompson Jr.; 181 L.A. Walther.

DONACIOJ 1981 (Gld.) ĝis la 30a de aprilo

CENTRO DE ESPLORO KAJ
DOKUMENTADO: Nov-Zelando:
Anonima 41,20.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Anonima: 99,32. Por agado en Zairio: Britio: A.W. Thomson 24,68. Nederlando: R. Moerbeek 100,00; W.A. Verloren van Themaat 25,00; R. Vetter 100,00. Sumo ĉi-jara 2 367,72.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: E. Woller 77,47. Sumo ĉi-jara 943,38.

FONDAĴO TEJO: Belgio: E. Kehlet 62,46. FR Germanio: R. Fischer 44,24. Nederlando: A.A. Laverman 10,00; H.B. de Vries 25,00; S.A.K. van der Zee 20,00. Diversaj malgrandaj 23,00. Sumo ĉi-jara 581,74.

ĜENERALA KASO: Finnlando: Liisi Oterma 49,15; Y. Rautio 11,15; Lauro Vuolo 50,38. FR Germanio: W. Heinrich 221,17. Nederlando: J. A. Pinto de Sousa 25,04. Svislando: Rey-Zollinger 121,67. Usono: S. Culbert 198,11. Sumo ĉi-jara 5 044,24.

NOV-JORKA OFICEJO: Patronoj (minime \$100): Kanado: Bruce R. Crisp; Dorothy Henderson (K\$ 3000); Kenneth Price. Usono: Maria Gerson kaj Ralph M. Murphy; Jacqueline Reynolds; Lucille Thompson; Eugene Thompson Jr. (\$155,55); Humphrey Tonkin. Amikoj (mini-

mume \$10): Kanado: F.C. Kirk Crockett (\$20); W.D.B. Hackett (K\$25); H.J. Lewis; Alma More. Usono: Laura Chapman; Maxwell T. Cohen (\$50 memore al sia amata edzino Cecilia); Rudolph Couppez; Vivi Couppez; Phillip Driscoll (\$20); Sigmund M. Klimowicz (\$25); Franklin Montenegro (\$50); Mano Sivasankar; Pearl Wegher. Sumo ĉi-jara: 12 664,40 gld.

PATRONOJ DE TEJO: 25 R. Corsetti, Italio. 26 A. Fighiera-Sikorska, Hispanio. 27 E. Gimeno Palau, Hispanio. 28 S. Martina, Italio. 29 C.B. Zondervan, Nederlando. 30 E. Burg, Nederlando. 31 J. Calado, Nederlando. 32 W.J.H. Derks, Nederlando. 33 J. Dunnewold, Nederlando. 34 J. Heetkamp, Nederlando. 35 W.L. van Leeuwen, Nederlando. 36 W.H. Mook, Nederlando. 37 F.J. Pieterse, Nederlando. 38 J.A. Pinto de Sousa, Nederlando. 39 D. Prins, Nederlando. 40 M. Renooy, Nederlando. 41 R. Vetter, Nederlando. 42 J. Rolt, Nov-Zelando. 43 E. de Coene, Belgio. 44 L.I. Lara, Brazilo. 45 E. Kehlet, Belgio.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ekzameno
e Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 42 (pri la demando vidu nian aprilan numeron)

- | | |
|-------------|------------|
| a. barĉo | e. tempuro |
| b. bujabeso | f. halvao |
| c. kareo | g. kumiso |
| ĉ. kuskuso | ĝ. mateo |
| d. pilafo | h. arako |

DEMANDO 43 (vi povas kontroli vian respondon sur la paĝo 118)

Ekde la estiĝo de Esperanto pluraj verkantoj, tradukantoj kaj aliaj funkciuloj de la organiza kaj kultura vivo en la Esperanto-movado kaŝis sin malantaŭ pseŭdonimoj aŭ plumnomoj. La esperantisto, kiu iniciatis tiun kutimon, estis sen ombro de dubo d-ro Esperanto mem (pseŭdo-

nimo de d-ro Zamenhof). Sekvas dudek nomoj kaj alinomoj, ĉiuj intermiksitaĵ. Ĉu vi povas rearanĝi ilin, parigante la kaŝnomon kun la vera nomo? Inter la dek homoj estas po unu anglo, aŭstro, belgo, bulgaro, franco, hungaro, italo, polo, ruso kaj sviso. Nur unu el la dek estas virino.

- | | |
|--------------------|----------------------|
| a. Otto Maschl | h. Lucien Laurat |
| b. Marin Ljubin | i. Gaston Waringhien |
| c. Lali Blond | j. Maria Pranicka |
| ĉ. Petro Stojan | ĵ. Johán Valano |
| d. Valerio Ari | k. Asen Grigorov |
| e. Arie Ben Guni | l. Giorgio Silfer |
| f. Jan Fethke | m. Ellen Gregory |
| g. Tazio Carlevaro | n. Edo Bernasconi |
| ĝ. Jean Forge | o. Claude Piron |
| h. Nenjo Rimanto | p. Lajos Tárkony |

24-jarulo volus korespondi tutmonde: Hosejn Moĝani, No. 16 Kuche Yazdi Pour, Bagh farid Mina, Khiaban 17 Shahrivar, Tehran, Irano.

Dekjaraj gepartoprenontoj de la 66a UK deziras korespondi per pk, leteretoj. Skribu al: CP 233, BR-96200 Rio Grande, Brazilo.

Korespondamikojn serĉas 31-jara iranano: Ghadam Yari M. Tahgi, Khiaban Ethbal Kuche Ennami No. 39, Tehran 17, Irano.

Kun virinoj, junaj kaj pli aĝaj, volus korespondi 19-jara s-ro Heidari Kareh, Yousef-Abad-Bistoon St. 25A Ave. No. 1, Tehran, Irano.

Tutmonde pri vojaĝoj, bildkartoj, poŝtmarkoj kaj aliaj temoj deziras korespondi: s-ro Gim Dong Han, 774 Sinchundong-3, Donggu, Daegu 635, Koreo.

22-jara studento deziras korespondi tutmonde kaj interŝanĝi diskojn de moderna muziko: Zbigniew Pleśniak, ul. Jagiellonów 6/28, PL-37-500 Jarosław, Pollando.

26-jarulo serĉas korespondantojn tutmonde: Pour Ghassab Ghasem, Khiabantehran no-ganbbimarestan Gorgani, Khiaban nagi No. 329, Tehran 16, Irano.

Hungaraj plenaĝuloj, diversprofesiaj (instruistoj, inĝenieroj, teknikistoj, lernantoj 17-36 j.) deziras korespondi tutmonde. Nia komuna adreso: Esperanto-Kurso, ĉe Jenő Zágonyi, Cp. 119, R-4000 Sf. Gheorghe, Rumanio.

Irana junulo volus korespondi tutmonde: Mostafa Khaksa, Khiban Nosrat Charrah Avesta No. 276, Tehran, Irano.

15-jara skoltino deziras korespondi kun samaĝaj komencantoj: Katerina Górna, Dobrzyniewo, PL-89-311 Falmierowo, Pollando.

Korespondantojn serĉas 32-jara: s-ro Asgar Fahim, Khiaban Iranmehr No. 259, Tehran 17, Irano.

Por letervespero fine de julio, nova E-grupo petas salutkartojn, leterojn, Esperantaĵojn: Esperanto, H. Savickiey 33/18, PL-65-559 Ziel. Gora, Pollando.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke rabaton por sinsekvaj ripetoj ni donas nur al enkadrigitaj anoncoj, kiel tiuj sur la kontraŭa paĝo, sed ne al anoncetoj.

Vi parolas Esperanton, sed ankaŭ vi devas studlegi en la angla. Do, kial ne mendi viajn anglalingvajn librojn rekte de esperantista librovendejo en Anglujo? Mendu de Language Services, 17 High Street, St. Peter's, Broadstairs. Atentigu ankaŭ viajn kolegojn.

Esperantistoj kunkonstruas okul-klinikon en Kamerunio. Informojn donas: s-ro Jacques Tuinder, iniciatinto de la Agado E3, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando.

Ĉe-kursoj necesas! Kurso tuj paroliga: *Esperanto laŭ la patrino metodo*. 320 paĝoj, DM 50,00. La kursokonversacio nur en Esperanto. August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61. Poŝtekkonto Hamburg 150 58-209.

21-jara pola studento volus korespondi tutmonde: Milosz Wroblewski, Ul. Malczewskiego 35 m 35, PL-93-154 Łódź, Pollando.

Irana junulo deziras korespondi: s-ro Razzagh Ghazanfarian, Robat Karime Asli Ave., Taghatoe Firuz Abad Kuch Jalal No. 14, Tehran 13, Irano.


80 diversaĝaj korespondemuloj, plej multe junaj, deziras interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, diskojn kaj ideojn pri aktualaj temoj kun ĉiuj landoj. Skribu al CELI, Av. Deodoro, 802, Cidade Alta, BR-59000 Natal/RN, Brazilo.

Studento pri medicino, 19-jara, serĉas korespondantojn: Paweł Krakowiak, Malczewskiego 30/19, PL-93-154 Łódź, Pollando.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

25-jara irana virino deziras korespondi: s-ino Mahai Afsaneh, P.B. 34-164, Tehran 13, Irano.

Vendo! Jarlibroj de UEA, de 1909 ĝis 1929. Ofertojn sendu al s-ro L. OhUiginn, P.O. Kesto 801 "B", Ottawa, Ont., Kanado K1P 5P9.



Instruisto el Irano deziras tutmonde korespondi: Mehdi Zargarpur, P.B. 71/655, Tehran 17, Irano.

Atenton junaj esperantistinoj. Sen-paga veturo kaj 1-3-monata restado en Finnlando. Kiu deziras esti gasto de mezaĝa finna negocisto, bv. skribi kaj sendi la foton. Pentti Salminen, Ilomäentie 1, SF-00840 Helsinki 84, Finnlando.

Tutmonde, pri ĉiuj temoj, deziras korespondi 14-jara irana junulino: f-ino Gelare Motamedi, 7 Hashemi 1st St. Daryan-now, Sattar Khan, Tehran 14, Irano.

Por popularigi Esperanton en nia urbo sendu salutkartojn al la urb-foiro okazonta fine de aŭgusto. Ni penos respondi al ĉiuj. Watford Esperanto Society, 291 Gammons Lane, Watford, Anglujo WD2 5 JR.

Ili serĉas amikojn: Huyunh Van Thoai (apude), Sara Su Jones (meze) kaj Gelare Motamedi.



Nova E-klubo en Hinda Unio kun danko akceptus ĉiaspecajn Esperantajn eldonaĵojn. Helpu per sendo de libroj kaj revuoj al: Ravindranath Dubey, 21 Patrakar Colony, Indore (M.P.), Hinda Unio.

30-jara irana viro deziras korespondi: s-ro Hesami Ardeshir, P.B. 34-164, Tehran 13, Irano.

Serĉas binditan kolekton de Literatura mondo: Jean-Claude Aubry, B.P. 596, Odienné, Ebura Bordo.

6-jarulino deziras leteramikojn de ĉiuj landoj. Miaj interesoj estas biciklado, violonado, desegnado, baletoj kaj belaj vestoj. Sara Su Jones, 452 Aldine, Apt. 501, Chicago, IL 60657, Usono.

Social-Humanista Gazeto: Internacia revuo, dulingva. (N-ro 1.) Laŭvola abonprezo, pagenda post la ricevo de la gazeto, per poŝtmarkoj. Apartat 313, Terrassa, Hispanujo.

Ŝparu ĉe UEA! La unuaj membroj, kiuj faris fiksdajn mondeponojn ĉe UEA, jam ricevis la 6-procentan renton por la unua deponaro. Ankaŭ via mono povas doni al vi renton de 6 procentoj en guldenoj. Samtempe vi helpas la Asocion. Petu la regularon ĉe la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio.

Uzitajn kaj novajn librojn bv. donaci por vendado dum la unua tuthinda Esperanto-renkontiĝo (komence de 1982) al la organizanto: P.V. Ranga Nayakulu, P.B. No. 566, Vijayawada 520003, Hinda Unio.

22-jara komencanto deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj: Huynh Van Thoai, 108 Lô V chung cu Ngô Gia Tu, Phuong 3, Quán 10, T.P. Hô Chi Minh, Vjetnamio.

Orienta esperantisto, 30-jara instruisto, volas korespondi kun esperantistoj el aliaj landoj: Taghi Khosravani-Shariati, No. 8/41 Banafshe Lane, Amirsharafi St., Tehran 16, Irano.

ekzameno
e Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 43 (pri la demando vidu la paĝon 116)

- Giorgio Silfer = Valerio Ari. Li estas italo, nuntempe loĝanta en Svislando. Dum pluraj jaroj li estis la ĉefredaktoro de *Literatura foiro*.
- Edo Bernasconi = Tazio Carlevaro. Li naskiĝis en 1945 en Tiĉino, Svislando. Profesie li estas kuracisto, specialisto pri la psikiatrio. Krom pri Esperanto li okupiĝas ankaŭ pri la historio de aliaj planlingvoj.
- Jean Forge = Jan Fethke (1903-1980). Li naskiĝis en Pollando kaj laboris en Berlino kiel filmreĝisoro. Li estas plej bone konata kiel aŭtoro de fantaziaj aventur-romanoj kaj noveloj originale verkitaj en Esperanto.

ĉ. Nenjo Rimanto = Ellen Gregory (1891-1976). Ŝi estis angla esperantistino, kiu aktivis dum pli ol 65 jaroj kiel instruanto kaj verkanto. Ŝiaj libroj en Esperanto por junaj infanoj aperis sub ŝia plumnomo.

d. Marin Ljubin = Asen Grigorov. Li naskiĝis en 1903 en Bulgario kaj laboris kiel ĵurnalisto. Li tradukis bulgarajn beletraĵojn en Esperanton, redaktis revuojn kaj verkis originalajn novelojn kaj poemojn en Esperanto pri proletaj temoj.

e. Lucien Laurat = Otto Maschl (1898-1973). Li naskiĝis en Aŭstrio, estis kamarado kaj subtenanto de Eŭgeno Lanti kaj fariĝis aktiva membro de Sennacieca Asocio Tutmonda ekde ĝia fondo. En la jaroj 1923-1927 li estis profesoro pri politika ekonomio en Moskvo, kaj inter 1932-1939 li instruis en laborista altlernejo en Parizo.

f. Johán Valano = Claude Piron. Li naskiĝis en 1931 en Belgio kaj nuntempe loĝas en Svislando. Dum pluraj jaroj li laboris kiel tradukisto ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Li verkis originalajn poemojn en Esperanto kaj estas konata ankaŭ kiel aŭtoro de krimromanoj.

g. Maria Pranicka = Petro Stojan (1884-1961). Li naskiĝis en Besarabio, tiutempe parto de Ukrainio. Post mezlernejaj kaj universitataj sciencaj studoj, li okupiĝis pri ruslingva leksikografia laboro. Lia plej grava verko en Esperanto estas *Bibliografio de internacia lingvo*, eldonita en 1929, represita en 1973.

ĝ. Lali Blond = Lajos (aŭ Ludoviko) Totsche/Tárkony (1902-1978). Li estis hungara oficisto, kiu aktivis kiel esperantisto en la Budapeŝta Skolo. Li estas plej konata kiel poeto, sed li ankaŭ tradukis hungarajn novelojn en Esperanton kaj verkis studaĵon pri la Esperanta literaturo.

h. Arie Ben Guni = Gaston Waringhien. Li naskiĝis en Francio en 1901 kaj estis agregacia profesoro. Li ĉefredaktis *La nica literatura revuo*, tradukis multajn poeziajn verkojn en Esperanton, verkis eseojn pri la esperantologio kaj faris valorajn kontribuojn al la leksikografio de Esperanto.

NOTO: En nia julia/aŭgusta numero finiĝos la rubriko "Ekzameno E". Tial vi trovas ĉi-foje kaj la demandon kaj la respondon samnumere.



ĈIUTAGE

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1530 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝt-kesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.30 Pekino, 30.42m (9860 kHz), 19.34m (15510 kHz). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.67m (11685 kHz), 19.81m (15145 kHz). I.

15.30-16.00 Varsovio, 42.11m (7125 kHz), 31.50m (9525 kHz). I.P.

20.00-20.30 Pekino, 32.00m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz), 26.21m (11445 kHz). I.

21.30-22.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6096 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.

22.30-23.00 Pekino, 26.05m (11515 kHz), 19.78m (15165 kHz). I.

DIMANĈE

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.66m (15260 kHz), 13.90m (21575 kHz). I.P. ORF, Esperanto, A-1136 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.

19.05-19.15 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P.

Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

23.00-23.15 Rio de Janeiro, 214m (1400 kHz). P. Brazilia Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20000 Rio de Janeiro ZC 58, Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Pri aliaj horzonoj v. en la Jarlibro 1980, p. 90. Mallongigoj: I = informoj, P = parolado, K = kurso.

Sorocaba, Esperanto-redakcio, rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

20.30-20.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P.

MARDE

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

MERKREDE

21.30-21.45 Sabadell, 187m (1602 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Esperanto-fako, C. Convento 22, Sabadell, Hispanio.

ĴAŬDE

05.10-05.25 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.30m (6210 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. I.P.

17.50-17.55 Vieno, 89.8 MHz (mod. frekv.). I. ORF, Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio.

18.00-10.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

SABATE

16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 30.71m (9770 kHz), 19.28m (15560 kHz). I.P.

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). P. Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Valencia, av. del Cid 154, Valencia 14, Hispanio.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Ne estas eble certigi, ke iu elsendo estas aŭ ne estas kaptebla en difinita lando aŭ mondparto. Tro multe da daŭraj aŭ nedaŭraj cirkonstancoj influas la propagadon de ondoj: atmosfera stato, sezono, parto de la tago, geografia ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, tipo de la ricevilo kaj de la eventuala anteno ktp. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj indikoj.

a) Direktitaj ondoj. **Pekino**: 9860 kaj 15510 kHz al Japanio kaj Koreo; 11685 kaj 15145 kHz al Sudorienta Azio; 9365, 9965 kaj 11445 kHz al Eŭropo; 11515 kaj 15165 kHz al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko; 6210, 9645, 11740 kHz al Ameriko; **Vieno**: 6155, 9770 kHz al Eŭropo; 15260 kHz al Nordorienta Ameriko; 15560 kHz al Proksima Oriento; 21575 kHz al Aŭstralio kaj Azio.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: **Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Zagrebo**.

c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio de Janeiro, Sabadell, Sorocaba, Valencio** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (M.F.).

EL HISPANIO mikslingva internacia elsendo komuna inter Radio San Sebastián kaj Radio Bilbao estas aŭdebla ĉiun dimanĉon matene inter mezonokto kaj 01.30 GMT. Ondolongoj: 303m (990 kHz), 238m (1260 kHz). Uzataj lingvoj: hispana, Esperanto, franca, germana, sveda, angla. Ondoj kapteblaj en tuta Eŭropo, sed precipe en la sudo kaj okcidento.

Ne sufiĉas nur aŭskulti radio-programojn en Esperanto! Necesas foje skribi al la redakcioj. Radio-elsendoj ne havas abonantojn kaj eldonkvantojn por kalkuli. Viaj leteroj estas la sola signo pri la populareco kaj dezirindeco de tiu valora praktika utiligo de la Internacia Lingvo.

MISTRAKTO DE AMIKOJ

POST militoj kaj similaj katastrofoj, ni ofte miras pri hororaj kruelaĵoj, pri "besta" konduto de la homoj dum tiaj periodoj. Verdire, la bestoj kondutas multe malpli "beste" kaj multe pli "home" ol tion kapablas fari homoj mem. La homoj ne ĉesas ĉiutage trejni sin en la metio de hororo eĉ dum la tiel nomataj "pacaj periodoj", des pli ke oni en ĉi tiu mondo senriproze militas kaj torturas en almenaŭ kelkaj anguloj de la terglobo. Krome, la homoj ĉiutage ekzercadas sian kruelecon pere de malhoma traktado de la bestoj. Tio ne okazas en la ĝangaloj sed plej ofte en la centroj de la tiel nomataj civilizo kaj kultura mondo.

Antaŭ kelkaj monatoj fine eksplodis skandalo pro la maniero en kiu oni traktas la ĉevalojn, eksportatajn el Pollando kaj kelkaj aliaj orienteŭropaj landoj al Francio kaj FR Germanio. Jen la rakonto:

Vi eble ne scias, ke okcident-eŭropaj buĉistoj ĉiujare importas pli ol 60 000 ĉevalojn por kontentigi gastronomiajn bezonojn de siaj klientoj. Pro komercaj aŭ doganaj kialoj, oni ofte intence vundas tiujn ĉevalojn antaŭ ol ekspedi ilin laŭ la longa vojo tra la kontinento al la, ekzemple, francaj buĉejoj. Oni enŝtopas po dudekon da ĉevaloj en neadekvatajn vagonojn aŭ kamionojn. Ligitaj, ili kontuziĝas kontraŭ la bariloj aŭ vagonvandoj. Kiam temas pri kamiona transporto, ili spertas ĉiun deklivon kaj vojkurbiĝon en la reliefo de Eŭropo.

Tiu malhome organizita vojaĝo ofte daŭras du semajnojn, dum kiuj la ĉevaloj restas ĉiam ligitaj sub la maldika lada vagonsegmento, kiu somere kapablas provizi la temperaturon de plus 50 gradoj celsiusaj, kaj vintre glaciigita je minus dudek gradoj. Kvankam ekzistas amaso da leĝoj kaj preskriboj, kiel nutri la ĉevalojn dumvoje kaj kiel ofte prizorgi ilian soifon, regule okazas, ke pasas pluraj tagoj antaŭ ol aperas eĉ eta fojno-plado. Kiam la vojaĝo daŭras plenajn du semajnojn, nur unu aŭ du-foje la bestoj ricevas iom da akvo. Eble ankaŭ vi ne scias, ke ĉevalo normale bezonas tri-dekon da akvolitroj en 24 horoj, ĉiutage.

Pro ĉio ĉi, nur ok el dek ĉevaloj atingas la celon de tiaj horrorvojaĝoj. Kaj el tiuj ok, nur kelkaj ankoraŭ estas en tolerebla stato, ĉar plej ofte temas pri

maljunaj ĉevaloj, kiuj pasigis sian tutan vivon fidele laborante por siaj mastroj.

Necesas pri ĉio ĉi paroli kun la kompetentaj instancoj, tiel en la eksportaj kiel en la importaj landoj. Necesas pri la skandalo atentigi la aŭtoritatojn en la ministerioj pri agrikulturo kaj transporto. Bezunate estas paroli al terkulturistoj, bestobredistoj, studentoj en agrikulturaj lernejoj.

Kial ĉevaloj dum sia lasta vojaĝo ne meritas la trakton, kiun ricevas la sudamerikaj bovoj, kiujn oni almenaŭ ne torturas sed buĉas tie, poste eksportante la viandon al Eŭropo.

Ekde la praepokoj, jam de jar-miloj, la ĉevalo estas unu el la ĉefaj kaj plej fidelaj kunuloj de la homo. Ĝi ankaŭ nun meritas pli homan kaj malpli bestan traktadon.

A. Bepperling,
fakdelegito pri sporto

**Janez Menart
(1929):
MILITĈEVALO**

El la slovena,
danke por
A. Bepperling,
tradukis
Jozefo Velebit

**Ĝi time staras kun ŝirita haŭto
kotplena, magra kaj melankolia.
Neniam iu ĝin karesas milde
insult' kaj batoj estas gajno ĝia.**

**Tiregas ŝarĝon ĝi de l' tag' al tago.
Kaŭzo kaŝitas, ĝi nur jugon konas,
feliĉosent' ĝin kaptas nur en dormo
kaj se servisto ion kripe donas.**

**Kaj ĝi forperdas forton jarpostjare;
de freŝ' kaj jun' nenio restos vere.
Kaj fine bridoj ĝin militen tiros
kaj por patrujo falos ĝi ofere.**

**Pri ĝi neniun iun triston sentos,
nek milda man' ĝin prenos post batalo.
Nur la militraport' ĝin enkalkulos:
... pli ol mil kvincent falis el ĉevaloj...**



Aperis la listo de gastigantoj 1981

410 gastiglokoj en
48 landoj!

TEJO-membroj trovos
en *Kontakto* 1981/1
kuponon, kiu proponas
rabaton de 50% je aliĝo!

Perantoj en pluraj landoj akceptos aliĝojn en loka valuto.
Akirebla ankaŭ de J.-M. Cash, 5 allées des Félibres, F-31520
Ramonville St.-Agne, Francio (18FF aŭ 9 irpk), aŭ de la
Libroservo de UEA (9,00 gld. plus sendokostoj).

La sola trivoluma (1300 paĝoj kun fotoj)
movada kaj literatura

HISTORIO DE ESPERANTO

de L. Courtinat

Historio laŭ la kongresoj; recenzoj ĝis 1960.
Mendebla ĉe UFE, 4 bis rue de la Cerisaie,
F-75004 Paris, 50 ff plus afranko, aŭ ĉe la
Libroservo de UEA.



Internacia Feria Altlernejo La Chaux-
de-Fonds (Svisio) 23-28.8. 1981:
Kurso-Seminario pri IDO-kulturo kaj literaturo.
Informas detale T. Carlevaro, Via Villette 8a,
CH-6500 Bellinzona.

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ

Kompilis mag. Isaj Dratwer

Eldiroj de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, lingvis-
toj kaj aliaj pri Esperanto kaj la internacilingva
ideo. "La tre valora verko de Mag. Dratwer devas
esti rigardata kiel suplemento al tiu ĉi libro." (El
la antaŭparolo de *Esperanto en perspektivo*.) Dua
eld. (1977), konsiderinde ampleksigita kaj ĝisdat-
igita. 360p. Prezo: 30,00 guldenoj. Ĉefa distribu-
anto: Libroservo de Universala Esperanto-Asocio.

SE VI SERĈAS SERIOZAJN KORESPONDAN-
TOJN, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo
(ekz. por lernejo), turnu vin al la KORESPONDA
SERVO de UEA. Adreso: K.S.M., 12 rue des Ja-
cobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

Plena analiza gramatiko de Esperanto kompletigas la kvaropon

Kiam en 1970 aperis *Plena ilustrita vortaro* (114,30 gld.),
ĝi estis la sola baza verko havebla en la movada libro-
merkato. En 1974 aldoniĝis al ĝi *Esperanto en perspek-
tivo* (84,00 gld.). Antaŭ du jaroj, Hungara Esperanto-
Asocio reprenis la malnovan *Enciklopedio de Esperanto*
(45,00 gld.), kaj — fine — per la eldono de *Plena analiza
gramatiko de Esperanto* UEA kompletigis tiun eminentan
kvaropon de la bazaj kaj elĉerpaj konsultolibroj pri (pli-
malpli) ĉiuj aspektoj de la Internacia Lingvo kaj la Espe-
ranto-movado.

Se la vendoritmo de *Plena analiza gramatiko* konserviĝos ankoraŭ por ioma tempo, tiu lasta
aliĝinto al la kvaropo estos ankaŭ la unua kiu ekmankos denove, ĉar en duona jaro vendiĝis
pli ol 1200 ekzempleroj. Pensu pri tio, kiam vi kunmetas vian novan libromendon!

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935), K. Kalocsay (1891-1976) kaj G. Waringhien (1901 -). Rotter-
dam: Universala Esperanto-Asocio, 1980 (4a tralaborita eldono). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0.
Prezo: 48,00 (por Nederlando 49,92) gld., plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3 ekzemplera mendo.



SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ (5a sesio)
UNIVERSITATO DE LIEĜO (BELGIO)
 05 - 19 de julio 1981

**S
U
K
,
8
1**

Sekcio E: Ekologio

- 1-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
 Sociekonomia bazo de la nuntempa
 ekologia krizo
 2-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
 Ekologiaj disponfontoj por elnutrado
 de la loĝantaro

Sekcio P: Pedagogio

- 1-a semajno: H. FRANK (FR Germanio),
 Propedeŭtiko de la klerigscienco
 prospektiva
 2-a semajno: P. DENOËL (Belgio),
 Elementoj de la homa fiziologio en
 rilato kun la edukado
 S. LEHRL (FR Germanio),
 Enkonduko en la informpsikologion
 kaj ties pedagogian aplikon

Ĉiu kurso estas semajna kaj ampleksas
 12 aŭ 18 lecionojn po 45 minutoj, kiuj
 okazas de lundo ĝis vendredo. Eblas sekvi
 unu aŭ plurajn kursojn, eĉ en ambaŭ
 sekcioj. Ekzamenoj. Kulturaj aranĝoj.
 Perfekta Esperanto-kurso.

KOTIZOJ: Programkostoj (unu kurso
 dum unu semajno): 1 200 bf; studentoj
 900 bf. Restadkostoj (sen tagmanĝoj;
 modifeblaj): ĉ. 2 500 bf semajne. Perfek-
 ta Esperanto-kurso (semajne): 500 bf.

*Petu detalajn
 informojn kaj
 aliĝilon ĉe:
 SOMERAJ
 UNIVERSITA-
 TAJ KURSOJ,
 Boîte Postale 9,
 B - Liège X,
 Belgio.*

Ĉu vi ŝatus profesie labori por Esperanto?

UEA serĉas novan oficiston por plenumi
 unuavice kongresajn kaj turismajn labo-
 rojn. Bezonataj kvalitoj estas iniciatemo,
 administra kaj komerca talento, kapablo
 bone rilati kun kunlaborantoj kaj repre-
 zenti la Asocion ĉe eksteraj instancoj,
 laŭeble sperto pri la vojaĝ-industrio, flua
 scipovo de Esperanto kaj eventuale de
 aliaj lingvoj.

Salajro estos interkonsentita. Posteniĝo
 eblas ekde oktobro 1981. Sinproponoj
 estu senditaj al la Direktoro de la Centra
 Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

KIAL ONI TRADUKAS TIOM DA ARTIKOLOJ EL

MONATO

internacia magazino sendependa

EN NACIAJN LINGVOJN?

Ĉar en MONATO oni trovas, kion en neniu nacilingva
 revuo oni povas legi.

Se ankaŭ vi volas legi ne la tradukojn, sed la originalojn,
 petu provexempleron kontraŭ du internaciaj respond-
 kuponoj, ĉe la eldonejo: TK/Stafeto, Miksebaan 65A,
 B-2130 Brasschaat, Belgio. (Tamen memoru, ke unu per-
 sono povas nur unufoje fari tian peton.)

Pri ĉi tiu unika revuo la legantoj juĝas jene (laŭ enketo
 farita fine de 1980): 85% diras, ke ĝia enhavo estas varia.
 80% diras, ke la lingvo en MONATO estas korekta, 18%
 trovas ĝin facila. Ne mirige do ke 59,75% legas la plej
 grandan parton, kaj 28% eĉ legas ĉion. Kiam ankaŭ vi
 estos tiel kontenta leganto de MONATO?



40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj jare. Jarabono 49,50 germanaj markoj aŭ 800 belgaj frankoj.
 La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo TK/Stafeto (adreso ĉi-supre), al unu el la landaj perantoj de
 MONATO aŭ al UEA (52,50 gld.; por Nederlando 54,60 gld). Dum 1981 en ĉiu numero de MONATO vi povas
 legi novan kriminal-novelon de la furora Esperanta verkisto Johán Valano.